

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro (27) 3/2007 ★ ISSN 0032-2431

2007

TOKIOHAMO



2008

ROTTERDAMO



2009

SEKRETA LOKO EN POLLANDO

?

Bjalistoko aŭ Poznano?

Polaj esperantistoj atendas la decidon...

3
2007

Enhavtabelo:

1	Politikumi... <i>Kazimierz Leja</i>
3	La kabeigo de Kabe <i>Jean Amouroux</i>
6	La Esperantistoj Kunvene <i>(Sergiej Tyrin)</i>
10	Paranoja Pollando <i>Ignacio Ramonet</i>
12	La buĉinto de Esperanto-redakcio suspendita <i>Libera Folio</i>
13	Komitatanoj de UEA elektitaj sen voĉdono <i>Libera Folio</i>
14	La sekva prezidanto (?) volas reinventi UEA-n <i>Libera Folio</i>
17	La estraro de UEA decidis kongresi en Pollando... <i>Libera Folio</i>
19	Rusianoj pretas kongresi en Moskvo sen UEA <i>Libera Folio</i>
20	Ses novaj akademianoj elektitaj <i>Libera Folio</i>
21	Selten pri Esperanto en la EU-parlamento <i>Libera Folio</i>
22	UN deklaras 2008 internacia jaro de lingvoj <i>Libera Folio</i>
23	Kiam temas pri fremdaj lingvoj, ni ĉiuj iĝas masofistoj! <i>Claude Piron intervjuita de Abruza tagjurnalo</i>
25–32	aliaj primovadaj aferoj <i>diversaj fontoj</i>
26	Preskaŭ ĉio pri la prepozicio LAŬ <i>Czesław Baranowski</i>
28	Esperanto en la interkultura komunikado <i>Katarzyna Szafarska</i>
29	Mi estas homo – originalaj verkoj de d-ro L.L. Zamenhof (recenzo) <i>Carlo Minnaja</i>

Kazimierz Leja

Politikumi...

Politiko plenumas en la nuntempa mondo altan, gravan rolon. Ĝi ĉirkaŭas nin — vole-nevole — ĉiutage, ĉiuhore kaj ĉiuloke. Gazetaro, TV kaj radio, kutimaj temoj de niaj interparoloj — ĉio ĉi abundas de politiko.

Por pli bone kompreni la vorton ‘politiko’ ni citu la du plej popularajn Esperantajn fontojn rilatantaj al la temo.

Vikipedio:

„La vorton **Politiko** (el la greka lingvo πολιτικός, koncernanta al πολις, „civito”) vaste disvastigis la tiutitola verko de Aristotelo, kiu priskribas ŝtaton kaj ties regmanierojn. Do, se origine la vorto priskribis aferojn koncernantajn al civito (kaj do urbon kaj ŝtaton), kune kun la verko de Aristotelo disvastiĝis la senco de scienco kaj arto rilata al la regado de ŝtato.

Nuntempe, politiko koncernas la agojn rilataj al ŝtato, dum la scienco, kiu tion studas, estas nomata politika scienco”.

Plena Ilustrita Vortaro (dua eldono):

„**politik**o **1** Arto de regado de socio: *politiko estas la arto trompi la homojn; jam la politiko povus ilin devigi plenumi sian vorton*². **2** Tuto de la ŝtataj aferoj: *ekstera, interna, nacia, internacia politiko; ni ne volas nin enmiksi en la politikon de niaj najbaroj*. **3** Maniero, kiel estas regataj aferoj de regno, entrepreno, asocio ks aŭ eventuale kiel estas plenumata

iu difinita agado [...]”.

Interesa estas la Zamenhofa priskribo de politiko: *la arto trompi la homojn...* kiu tute kongruas kun la interreta sondado, publikigita antaŭnelonge. Demanditoj devis respondi nur unu demandon: „Ĉu vi fidas al politikistoj?” Pli ol 70% respondis negative.

Estas interese, ke la vorto ‘politiko’ (simile al ‘burokratio’) estas rimarkata preskaŭ ĉiam negative, kvankam ĉi tiuj vortoj priskribas pozitivajn, eĉ deziregajn ecojn de homa aktiveco. Eduka politiko, eldona politiko — ambaŭ apartenas al la necesa en ĉiu serioza organizo agadplano kaj la agado mem (burokratio origine signifas la bone organizitan kaj plenumatan oficistan laboron!). Kiel facile ŝanĝiĝas la vera signifo de vortoj sub la influo de vivo!

Se ni rigardus antaŭen, kun la espero rimarki iujn pozitivajn ŝanĝojn (ĉu en nia lando, ĉu en Esperantujo), la tria difino de la vorto politiko plej utilas: „Maniero, kiel estas regataj aferoj de [...] asocio [...] kiel estas plenumata iu difinita agado...”. Do, parolante pri difinita agado kaj ties plenumado ni ankaŭ politikumas, en pozitiva senco de la vorto.

Kiam do mi aŭdas eldirojn de politikistoj, elektitaj por gvidi iun asocion, ke ili ne okupiĝas pri politiko, mi tuj scias, ke ili vere okupiĝas pri nenio alia ol „trompi la

homojn”. Kaj denove la reala vivo konfir-
mas tiun ĉi mian supozon, bedaŭrinde...
Por esti pli konkreta (kion niaj Legan-
toj ofte postulas), antaŭnelonge mi
eksciis, ke *Pola Esperantisto* konstante
atakas PEA-n, ne volas informi pri espe-
rantistaj aranĝoj, ktp., estas do preskaŭ
kontraŭmovada. Tiaj kaj aliaj malfavoraj
opinioj, eldirataj oficiale i.a. dum la kunsidoj
de la Ĉefa Estraro de PEA pere de ĝia
prezidanto kaj la kasisto (nomata sekre-
tario), neniam estis oficiale transdonitaj
al la redakcio de *PE*, por havigi la ŝancon
al la akuzito defendi sin. Tio ankaŭ estas
la pruvita maniero politikumi...

Estante de la jaro 1976 membro de
PEA (kun longa, pli ol 10-jara paŭzo en
la jaroj 80. kaj 90.) mi revenis al la Aso-
cio kun la konvinko, ke pola Esperantu-
jo bezonas ĉiujn fortojn (ankaŭ la miajn)
por restituti grandan, fortan Movadon,
kies celo estas i.a. reakiri perditan dum
la pasintaj jaroj prestiĝon, ellabori no-
van, efikan solvon de kunlaboro inter
multiĝantaj E-organizoj, speciale en la
kampo de instruado, kaj multaj aliaj.

**Per ĉiuj miaj fortoj (kaj ankaŭ la mo-
no) mi faris por tio ĉion eblan (kaj eĉ pli),
laborante malgraŭ diversaj obstakloj kaj**

**personaj malhelpoj kaj akuzoj. Ne miru,
do, karaj Legantoj, ke ne vidante la bo-
nan volon de decidantoj rilate al helpo,
kunlaboro, respekto, mi decidis:**

1. rezigni pri plua aparteno al PEA,

**2. ĉesi la eldonadon de *Pola Esperanti-
sto* komence de la venonta jaro.**

La dua decido estas tiom pli facila, ke
ĝis nun oni prokrastas la elektojn de la
nova Ĉefa Estraro de PEA, kun kiu la El-
donejo HEJME subskribis la 5-jaran kon-
trakton pri redaktado kaj eldonado de la
revuo.

Dum la hieraŭa diskuto, okazinta en
Krakovo, redakcia stabo de *Pola Espe-
rantisto* decidis pripensi eventualan el-
donadon de alie nomata, nova revuo por
esperantistoj, depende de interesiĝo
kaj postuloj de la nuntempaj Legantoj
de *PE*. Tial ni atendas Viajn leterojn kaj
retmesaĝojn, esprimantajn Viajn dezi-
rojn, atendojn, kaj eĉ la proponon por
la nomo de la nova revuo. Por faciligi la
aferon, ni aldonas korespondan slipon al
la ĉimonata kajero de *PE*. Estu afablaj re-
sendi ĝin plenumita **ĝis la fino de julio**,
por ke ni povu en la aŭgusta kajero infor-
mi ĉiujn pri la fina decido.

Kazimierz Leja, 3-06-2007

*En la lasta numero de PE aperis „La kamizolo” de Bolesław Prus en la traduko de Kol. Danuta Kowalska. La materialo estis sendita de red. Tomasz Chmielik, kiu unue redaktis la tekston, ŝanĝante en kelkaj lokoj esprimojn kaj gramatikon, kaj aldonante mankantan, ne tradukitan tekston. Tio kaŭzis sendon de protesta lete-
ro de Kol. Danuta Kowalska al la redakcio.*

*Ĉi-loke ni petas pardonon de la Tradukintino pro ĉiuj ŝanĝoj faritaj sen inter-
konsento (tamen kun bona intenco de T.Ch.). Al la Legantoj ni proponas la konsul-
ton de la teksto en neŝanĝita formo, sur Interreta paĝo de PEA, laŭ la ĉi-suba li-
go: www.esperanto.pl en la sekcio ‘Literaturo tradukita’.*

KL

Jean Amouroux

La kabeiĝo de Kabe

Laŭ difino de G. Waringhien en „Plena Ilustrita Vortaro” (1977), ‘kabei’ estas fari kiel Kabe (pseŭdonimo de K. Bein), kiu, estinte tre vigla Esperantisto, subite kaj tute, forlasis la movadon.

Kazimierz Bein naskiĝis la 29^{an} de februaro 1872 en la bieno de sia patro, proksime de Varsovio. Li studadis lingvojn, matematikon kaj medicinon en Lodzo kaj en Varsovio, sed pogromoj kaj ties sekvoj faris, ke studojn pri oftalmologio li finis en Kazań, en 1899. La kuracarton li praktikis en Varsovio.

Kiam li respondis demandaron (21^{an} de januaro 1906) por esti membro de la definitiva Lingva Komitato (LK), la demandon ‘dato de via esperantistiĝo’ li spontane respondis skribante: 188, sed la du 8 li surskribis per 90 kaj aldonis 3, tiel ke aperis: 1903. Lia unua elano ne estis erara.

Kiel liceano en Varsovio, jam en 1887, kvankam ŝerce kun aliaj samklasanoj ĉar li estis pasia latinisto, li konsultis la unuajn lernolibrojn de D-ro Esperanto. Abonanto de la angla *Review of Reviews* kaj leganto de la Esperanta kroniko, en 1903 leviĝis la semo de 1887. Semajnon poste D-ro Bein vizitis sian samfakan kolegon, D-ron Zamenhof, sed ili ne parolis pri oftalmologio: estis la unua konversacio de Kabe en Esperanto.

La pseŭdonimo Kabe, kiun li mem el-

pensis kaj uzis, estis la franclingva [ankaŭ la pola – red.] prononco de liaj du inicialoj: KB = Ka Be.

La francan kaj germanan lingvojn li bone regis lege, skribe kaj parole, memkompreneble sen forgesi la polan kaj la rusan. La anglan, italan kaj latinan li scipovis legi.

„Internacie facile komprenebla frazeologio”, li deklaris, kaj teknika terminologio estis liaj ĉefaj interesoj en Esperanto kaj, malpli konate, baptonomoj.

Kabe estis modela stilisto por tradukoj, sed originale li ne verkis. Li apartenis al la varsovia komitato, kiu transprenis la redakcion de *Pola Esperantisto* ekde januaro 1908. Laŭ poŝtkarto, kiun li skribis (16-01-1908) al Th. Cart en Parizo, li havis plenan rolon sine de la redakcio. Ĝi tekstas:

Kara Amiko,

Mi ne ricevis Vian artikolon. Kia domaĝo! Ĝi ne povos aperi en la unua numero, sed mi esperas, ke Vi konservis kopion. Bonvolu sendi ĝin al ni, kaj ni publikigos Vian artikolon en la 2^a numero. Rekomendu la leteron, mi tre petas Vin.

Koran manpremon, K. Bein

Kelkajn monatojn poste, K. Bein jam ne plu apartenis al la redakcia komitato de *Pola Esperantisto*.

„Adesaro de Polaj Esperantistoj por 1909” instruas al ni, ke K. Bein estis unu el la kvar kunfondintoj de „Pola Esperantista Societo”, la 16^{an} de majo 1908. Antoni Grabowski ĝin prezidis kaj *Pola Esperantisto* iĝis ĝia monata organo. K. Bein havis nenian agantan rolon.

K. Bein partoprenis en la kvin unuaj Universalaj Kongresoj de Esperanto, kvankam ne ĉeestis en Barcelono (1909).

Dum la kvara, en Dresdono (1908), kiel kutime li multe laboris, ĉi foje kun N.P. Evtstifeieff, alia akademiano. Tiam, Akademio de Esperanto estis la supera Komisiono de la Lingva Komitato.

En Dresdono, ne nur li raportis pri la fondo de la esperantista akademio kaj pri la laboroj de la LK kaj ties Akademio dum la kvara kongreso, sed, kun Evtstifeieff, li benediktane laboris pri la freŝa verko de Paul Boulet, LK-ano, „Du mil novaj vortoj”. Fakte ili volis replikon, sed ne nur, al la kritiko de *Progreso* (centra organo de Ido). Subskribita de la sola Evtstifeieff aperis „Sciencega kritiko” en *Lingvo Internacia* de januaro 1909, kies redaktoro estis Th. Cart.

La jaro 1908 estis tre grava por la lingvo kaj la movado: ilin forte skuis la tertrema Ido–krizo. Anoj de la LK, kiuj partoprenis en la laborkunsidoj de la LK dum la Dresdena kongreso, jam pretis transiri al Ido. Sekvis ekŝiĝoj, forpeloj kaj kalumnioj en la esperantista tendaro, kaj kalumnioj flanke de la idistoj.

Malgraŭ tio, la 12^{an} de septembro 1908, K. Bein skribis al Th. Cart, direktoro de la sekcio „Komuna Vortaro” de la Akademio: „[...] Kun Evtstifejev (tiel) ni preparas solidaran liston por Via aldono al U.V. [...] La listo estos Via (tiel) kaj ni 5 plenumos Vian ordonon (tiel). Kiam la

kvin resendos la laboron, ili ĉiuj devas ricevi la tuton, por ke la tradukoj estu kontrolitaj ankaŭ de alilingvanoj, unuvorte ĉiu nacia traduko estos kontrolita de ĉiuj membroj, por ke ĉiuj tradukoj estu en plena interkonsento”. La bazan laboregon faris Evtstifeieff kaj Bein, kiu krome kunordigis la tuton. La ordo de la vortoj en Esperanto estas laŭ la alfabeto kaj por ĉiu la vorto en kvin aliaj lingvoj estas en la franca, angla, germana, rusa kaj pola.

Jam dekomence necesis do la kontrolo de diverslingvaj LK-anoj. Poste, Cart raportis al rektoro Boirac, prezidanto de la LK kaj Akademio, kiu mem sin turnis al ĉiuj anoj de la LK petante, ke ili kritiku kaj poluru la liston por fine alveni al „Unua Oficiala Aldono” al la „Universala Vortaro” (1909). Ĝi konsistis el 25 paĝoj da novaj „Radik-vortoj akceptitaj de la Lingva Komitato”.

Théophile Cart anstataŭis K. Bein por la kvar kongresaj laborkunsidoj de la LK en Barcelono (septembro 1909).

Kiel prezidanto de la ĵurio (proza sekcio), K. Bein sendis skriban mesaĝon (legita de d-ro Artigues) al Marie Hankel (Dresdono) Reĝino de la Unuaj Internaciaj Floraj Ludoj el kiu estas interese noti:

„La malfavora sorto katenas min en Varsovio...

...la bona stilo estas bazita ĉefe sur simpleco kaj natureco, kaj pro tio en Esperanto la plej bona rimedo estas: *ler-ta evitado de nenecesaj sufiksoj, kunmetitaj vortoj kaj tempoj*. Vivu do la simpla, natura Zamenhofa Esperanto...”

Dume, senkompate sin batalis esperantistoj kaj idistoj. Estis trista situacio, kiu forte vundis la senteblian koron de Kabe. Li tiam plene konsciis, ke komuna lingvo ne necese agordigas la korojn.

Tute rebakita lingvo kia Ido ne allogis lin, sed li „venis al firma konkludo, ke diversaj reformoj estas absolute neeviteblaj en Esperanto”. Proponoj liaj al Zamenhof, „terura konservativulo” (citiloj estas de Kabe) lin ne ravis kaj li ne volis akcepti. Kabe decidis ne plu diskuti kun Zamenhof pri reformoj, esperante ke baldaŭ li komprenos sian eraron kaj bedaŭros, ke li ne adoptis pli frue liajn proponojn. Tiuj ĉi konsideroj estas tiritaj el omaĝo de Kabe okaze de la 50^a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof en *Universo* („Internacia Revuo por la Belo”) redaktita de Albert Schramm — 1^a jaro, 4^a kajero (1909). Gravaj tri faktoroj:

- laŭdate jam de pli ol unu jaro kaj duono pasis la eksplodo de la Ido-tertreveno,

- Kabe bone sciis, ke Zamenhof legos lian konfesion en *Universo*. Ni krome notu, ke ambaŭ loĝis en Varsovio,

- Kabe estis je la pinto de la gloro kiel modela tradukanto kaj evoluiganto de la lingvo. Li tamen estis laca de la interfrataj bataloj, li, kiu en sia junaĝo suferis ek-

zilon pro maltoleremo. Li estis idealisto allogita ne nur de la lingvo Zamenhofa, sed ankaŭ de la tuta personeco de Zamenhof.

La 1^{an} de februaro 1911, K. Bein estis ankoraŭ vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, sed ne plu por longa tempo. Tre diskrete li forlasis la esperantistan scenejon. Pri vundoj de la koro oni ne facile parolas, eĉ ne Kabe.

Li lasis la esperantistojn imagi al si tion, kion ili volis koncerne lian kabejiĝon, sed li neniam liveris la verajn kialojn de sia intima sento, eĉ ne al Kalocsay. Kio koncernas la koron apartenas nur al si.

Kiam mortis Zamenhof, Kabe diskrete partoprenis en la funebra ceremonio, la 16^{an} de aprilo 1917.

Omaĝe al la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la 44^a Unversala Kongreso de Esperanto okazis en Varsovio. Kazimierz Bein mortis en Lodo unu monaton kaj duonon antaŭe, la 15^{an} de junio 1959. Kiel dankema signo de la esperantistoj, unu el la kongresaj salonoj ricevis la nomon „Kabe”.

Zamenhof elkreskis en multetna urbo, Bjalistoko (kiu nun situas en Pollando) kaj tie ofte spertis kverelojn inter la etnoj. Tiel li ekhavis deziron krei novan lingvon kiu povus funkcii kiel ponto inter la diversaj lingvogrupoj. Dum sia junultempo li multe okupiĝis pri sia lingva projekto kaj kiel 27-jarulo li prezentis ĝin sub la pseŭdonimo „Doktoro Esperanto”.

Zamenhof estis judo, laboris kiel okulkuracisto kaj havis familion kun pluraj infanoj. Li ankaŭ provis krei „neŭtralan religion” La Homaranismo, sed tiu projekto neniam vere disvastiĝis. Tamen Esperanto neniel havas rilaton al iu religio aŭ sekto.

(Citaĵo el la retpaĝo <http://eo.lernu.net>)
legu pli sur la sekvaj paĝoj...

La Esperantistoj Kunvene

La juda demando en la kongreso de Esperanto.

Por vi, usonanoj², kutimiĝintaj al ĉio grandskala, ja estas sufiĉe ordinara afero, ke kunvenas mil sescent delegitoj³ partopreni en kongreso. Sed por la loĝantoj de la galicia urbo Krakovo temis pri kolosa sensacio. Kolektiĝis ĉi tie esperantistoj el la tuta mondo, kaj la mil sescent gastoj pasigis ĉi tie unu semajnon. Tio estis kongreso de esperantistoj, kiu allogis la atenton de la tuta Polujo, kaj aparte tiun de Krakovo. La tutan semajnon Krakovo estis turnita nure al Esperanto kaj al la juda kuracisto Zamenhof, ĝi parolis Esperante, preĝis Esperante kaj laŭdegis Zamenhofon.

Kiu do estas doktoro Zamenhof kaj kio estas la karakterizaĵo de tiu Esperanto, kiun li kreis? En la Pentateŭko estas rakontite kiel la homoj ekribelis kontraŭ Dio kaj ekkonstruis turon, la Babelan Turon, ĝisĉielan, kaj kiel punis ilin Dio kaj disigis en naciojn kaj lingvojn igante ilin ne plu interkompreniĝi. Ekde tiam, de la Diso-generacio, ekekestis „la sepdeko da lingvoj”, pli ĝuste — miloj da lingvoj, kiujn la homoj paroladas ĉirkaŭ la globo. Multaj dialektoj malaperis, multaj novaj naskiĝis, kaj la homaro dum jarmiloj portas tiun ĉi deĉielan punon, malbenon de plurlingveco, kiu ne lasas al homoj kompreni unu la alian. La moderna scienco aboliciis la ĉastan fabelon de la Pentateŭko. Estu tiel; tamen la scienco ne scipovas unuigi la plurlingvan homa-

ron en unu nacion parolantan unu lingvon. Kaj jen la juda kuracisto Zamenhof el Varsovio deziras neniigi la malbenon de Dio la Eternulo kaj fari realon, ke ĉiuj homoj povu facile kompreni unu la parolon de la alia; por tio li inventis sian mondlingvon kaj nomis ĝin „Esperanto”.

Endas diri, ke Zamenhof ne estas la unua kiu pripensis kreadon de artefarita mondlingvo, facila por ĉiuj. Jam antaŭ tri-kvarcent jaroj, grandaj konataj personoj — la genia itala pentristo Leonardo da Vinci, la franca filozofo Dekart⁴ (*Descartes*) kaj la germana pensulo Leibnic (*Leibniz*) — atentis ĉi-aferon kaj eĉ provis krei tiajn lingvojn. Sed iliaj penoj rezultis je nenio. Nur antaŭ tridek jaroj (1879) sukcesis Ŝlejer (*Schleyer*), germana pastro, inventi facilan lingvon, kiu tuj vekis la atenton de vastaj rondoj, kaj iĝis sensacio en la tuta mondo. Kion ne sukcesis antaŭ tricent jaroj la grandaj filozofoj, ekpovis nuntempe simpla pastro, ĉar la kontaktoj inter la homoj iĝas ĉiujare pli intensaj; la granda migrado kaj la veturiĝoj igas la diversajn lingvojn intertuŝiĝi pli kaj pli forte. La lingvon de Ŝlejer, kiun li nomis „Volapük”⁵, ĉiuj akceptis ege entuziasme; tuj troviĝis en multaj landoj miloj da homoj, pretaj ellerni ĉi-lingvon, estis eldonataj ĵurnaloj kaj fonditaj lernejoj en la artefarita lingvo. Sed baldaŭ evidentiĝis ke „Volapük” ankoraŭ malproksima estas de la idealo, kaj oni tro-

vas en ĝi kelke da difektoj; ankoraŭ ĝi ne estas sufiĉe facila, ne sufiĉe fleksebla, kaj ĉefe — ne sonas bele. Ne multa tempo pasis kaj jen en vicigis danĝera konkuranto por „Volapük” — Esperanto kiun inventis Zamenhof en 1887.

Ŝlejer opiniis sian lingvon „Dia fenomeno”; li estis certa, ke la Sankta Spirito ŝvebas super „Volapük”. Laŭ tio, kion li rakontadis al siaj disĉiploj, dum la sonĝo venis al li anĝelo kiu ordonis krei la mondlingvon, samokaze senvualigante la regulojn de la nova lingvo kaj ĝian nomon. Vekiĝinte, la pastro metis sin al la plenumo de la ordono de sia Dio. Kaj kiam aperis la judo, Zamenhof, kune kun sia nova lingvo, Ŝlejer estis konvinkita ke estas fiagoj de la satano, malvirtiganta la Eternulon, kaj sub apogo de Dio kaj Jesuo la „sankta Volapük” venkos la „profanan judan Esperanton”. Tamen la Eternulo forturniĝis de la aroga pastro kaj favoris Zamenhofon evidente kaj nerefuteble. Apenaŭ restis adeptoj de Volapük nuntempe, eĉ la nomo de Ŝlejer forgesiĝas; dume ĝuste Esperanto venke sidas enesele, kaj junulo kaj oldulo kantglas laŭdojn super la lingvo kiun varsovia judo kreis.

Doktoro Ludvik Eliezer Zamenhof naskiĝis en Bjalistok en 1859. Li diplomiĝis en la Varsovia Universitato; loĝante en Varsovio, li laboras kiel okul-kuracisto. Multajn avantaĝojn havas lia lingvo, kiuj helpis ĝin supervenki „Volapükon” kaj ankaŭ ĉiujn aliajn lingvojn artefaritajn, kiuj anonciĝis lastatempe. Ĝia plej granda avantaĝo estas — la modesto; dum „Volapük” intencis subpremi ĉiajn vivantajn naturajn lingvojn, por ke ĉiuj homoj akceptu „Volapük”, Esperanto deziras esti nure help-lingvo por la vojaĝantoj,

enmigantoj ktp. Zamenhof klare scias sian rolon, li aspiras ne ŝanĝi la vojon de la mondo, sed faciligi por la homoj iliajn vagadojn kaj la interrilatojn. Ŝlejer estis utopiisto, dum Zamenhof estas agema homo, havanta noblan idealon. Krome, ja Esperanto estas ege facila, ĝian tutan gramatikon eblas skribi sur vizitkarteton kaj ellerni dum nuraj kvin minutoj. Ankaŭ la vortoj estas facile memoreblaj, aparte por tiuj, havantaj iome da lingvaj scioj. Eĉ por kompletaj malkleruloj estas pli facile lerni Esperanton ol iun alian lingvon. Ĉiu vorto estas skribata ekzakte same kiel ĝi estas prononcata, kaj la lingvo klarigas sin mem. Malgranda ekzemplo pruvos kiom talente konstruis Zamenhof sian lingvon: kaze de la kongreso, lernigis sin multaj kelneroj en la restoracioj de Krakovo paroli „Esperante”, kaj jam estis komunikantaj en ĉi tiu lingvo senprobleme kun la gastoj. Esperanto havas riĉan vortprovizon: estas en ĝi ok mil radikoj, kiujn Zamenhof kolektis el diversaj lingvoj, kaj per almeto de aliaj tridek silaboj estas eble konstrui kelkajn centojn da novaj vortoj. La lingvo tre belsonas, ĝiaj vortoj ne tro longaj estas kaj ege muzikecaj. „Volapük” baziĝis ĉefe sur la angla lingvo, kaj Esperanto — sur la itala, kiu estas unu el la plej belaj en la mondo. La „strangaj” vortoj laŭ longeco estis la kulpaj pri la plagoj de „Volapük”, ekzemple *kolonalutakifatabludacijalopaskretan* (kiu signifas: oficeja sekretario de la lamp-fabrika). Mala afero okazas en Esperanto, fluanta kiel akvo kaj belega por poezia verko.

Dek tri jarojn Zamenhof batalis senlace por tio, ke la mondo priatentu lian lingvon kaj ekinteresiĝu pri ĝi. Nur dum la tutmonda ekspozicio en Parizo en la

1900^a jaro, kiam amasiĝis en ĉi tiu urbe-
go sennombraj gastoj el ĉiuj anguloj de
la mondo, Zamenhof sukcesis vekti en la
publiko atenton al Esperanto. En la tut-
monda ekspozicio ĉiuj eksentis kiom gra-
va estas facila artefarita helplingvo, kaj
tuj enposteniĝis Esperanton. Tie estis
establita la institucio por la vastigo de
Esperanto. Kaj fine, nun ekzistas en la
mondo centoj da esperantistaj asocioj,
havantaj sume tridek du mil membrojn.
Aperas dekoj da gazetoj en Esperanto,
en la grandaj urboj ekzistas esperanti-
staj konsulejoj, kies delegitoj venas al la
stacidomoj por akcepti la vojaĝantojn-
esperantistojn, instrukcii kaj konsili al ili
kaj simile. Parolante Esperanton, eblas
veturi al grandaj urboj de Eŭropo, Ameri-
ko, Azio, Aŭstralio, nur portu la insignon
de Esperanto sur la roverso de via vesto,
kaj estu certa ke la „konsulo” vin reko-
nos, tuj disponigos al vi ĉiujn konsilojn kaj
instrukciojn, akompanos vin ĉien kaj es-
tos por vi tradukanto en la fremda urbo.
Ekzistas eĉ komercaj entreprenoj, kore-
spondantaj nure en Esperanto. De tem-
po al tempo okazas tutmondaj kongresoj
de esperantistoj, tamen ĉiuj rimarkas, ke
neniu el ili estis tiom granda kaj bela kiel
la sepa kongreso en Krakovo.

La kongreso estis organizita okaze de
la 25-jara jubileo de la apero de la gramati-
ka libro fare de d-ro Zamenhof. Alvenis
ĉi-tien reprezentantoj de pli ol tridek na-
cioj, eĉ el Ĉinujo, Japanujo, Hindujo kaj
Turkujo. El la granda amerika respubliko
venis dek delegitoj, kun s-ro Tecl, la re-
daktoro de la revuo „Amerika Esperanti-
sto”, kiel ĉefdelegito. La tuta urbo estis
festvestita dum tiu ĉi semajno kaj orna-
mita de la Esperanto-flagoj: verdkoloraj
kun stelo meze. Ĉiun vesperon okazis di-

straj baloj honore al la gastoj — kaj ĉio
en Esperanto. Lunde estis salutkoncerto
por Zamenhof, merkrede oni surscenigis
la tragedion „Mazepa” de Slovackij (*Sfo-
wacki*), en traduko Esperanta, kaj saba-
te la operon de Monjuŝko (*Moniuszko*)
„Halka”, ankaŭ en Esperanto. En ĵaŭdo
estis organizita granda maskobalo kaj
ĉiuj delegitoj venis en siaj naciaj vestaĵoj.
Eĉ Dion la Eternulon proprapersonone oni
altiris al la kongreso: en la preĝejo Anna,
en la evangelia preĝejo kaj en la juda si-
nagogo oni okazigis preĝojn en Esperan-
to. Ĝuste en tiu ĉi lingvo predikis ankaŭ
la rabeno Tahon. Fine la delegitoj vetu-
ris por ekskursi ĉe la Zakopane-monta-
ro⁶. La tuta kongreso pasis kun sendu-
ba ekzalto. La jubileulo, d-ro Zamenhof,
estis akceptita per enormaj aplaŭdoj.
Jam la unua plenkunsido de la kongreso
komenciĝis per krioj: „Vivu doktoro Za-
menhof; vivu nia Majstro!”⁷, kaj ĉiu kun-
sido estis plenplena de respekto-krioj
honore al „la granda instruisto Zamen-
hof”. Kiom da fojoj oni kantadis kaj re-
kantadis la „Esperon” — la marŝon de
Esperantistoj — nefacilas kalkuli. Apar-
te distingiĝis en ĉi-kongreso la usonaj
kaj la socialistaj delegitoj. La usonanoj
kolektiĝis ĉe monumento je memoro de
la nacia heroo de Polujo, Kosciŭŝko (*Ko-
ŝciuszko*), staranta en la ĉefa placo de la
urbo, kaj metis flor-bukedojn sub la pie-
destalon; vidinte tion mem-ariĝis gran-
da amaso de polaj patriotoj, ankaŭ aliaj
delegitoj, partoprenantoj de la kongre-
so, alvenis, kaj la usonanoj deklaris ke ili
deziras honorigi Kosciŭŝkon, kiun ankaŭ
Usono respektas kiel revolucian heroon.
Ĉi-okaze estis faritaj pluraj paroloj, dum
kiuj oratoris usonanoj, poloj, irlandanoj
kaj kroatoj. Prezente la socialismaj-

n-esperantistajn rondojn alvenis la kongreson dudek-iom da delegitoj. Laŭ ilia postulo, la Socialista Partio en Krakovo okazigis mitingon de du mil homoj kaj estis akceptita la jena decido: la socialistoj mondscale devas subteni la movadon de Esperantistoj; ili aspiru al tio, ke Esperanto estu enkondukita kiel lernobjekto en ĉiuj publikaj lernejoj; por ĉiuj internaciaj socialistaj kongresoj oni rekonu Esperanton kiel la kvaran kongreslingvon (ĝis nun estis rekonitaj la franca, la germana kaj la angla). Krom tio, dum la kongreso okazis dekoj da diversaj esperantistaj kunvenoj, pli malgrandaj: de sufragistinoj⁸, katolikoj, liberpensantoj, kuracistoj, komercistoj, ĵurnalistoj, spiritistoj, anoj de la Ruĝa Kruco, instruistoj, juristoj kaj tiel plu.

Ĉe la fino de la kongreso estis decidite danki la ĉinan registaron por la enkonduko de la lernado de Esperanto en la nova publika lernejo, establita en Pekino. Aldone, oni decidis kongresi venontfoje en Ĝenovo, Italujo. Ĵus antaŭ la fermo de la lasta kunsido alvenis telegramo, diranta ke la pastro Ŝlejer, inventinto de „Volapük“, ĵus forpasis. Zamenhof estis komisiita sciigi al la kongreso la malĝojigan informon. La kongresanaro honorigis la memoron de la forpasinto kaj disiris, dum en la koroj de la delegitoj pinĉis penso pri la sekretoj de la homa sorto...

Kelkajn vortojn pri la juda demando en ĉi tiu kongreso: eĉ tie ĉi, meze de la pura gajo kiun ĝojis ĉiuj pro la tutmonda idealista afero, estis akredolore sentata la ekzilo juda. Dum la malfermo de la kongreso delegitoj el dudek du nacioj petis la rajton por ĉiu nacio alpar-

li la kongreson per sia oratoro — kaj ĉi tiu dezirpeto ilia estis plenumita sen kromaj malfacilaĵoj. Tamen kiam venis la esperantistoj-judoj havantaj pornacian pensmanieron, kun ĝuste la sama deziro en iliaj buŝoj, forpuŝis ilin la sekretario de la kongreso d-ro Rozenŝtok — judo asimiliĝinta mem — sen ajna preteksto, simple ĉar „la judoj, ne havas ili propran lingvon“! Kaj kiam iris ili plendi pri tio ĉi ĉe Zamenhof, respondis tiu: „Mi mem naciema judo estas, kaj amas mi la judan lingvon kaj laboras por ĝia evoluo, sed ĉi tie ne povas mi agi iel ajn, ĉar elstarante kiel judo mi kaŭzos malprofiton al Esperanto“. Ne dezirante damaĝi la festecan etoson, la naciaj judoj ŝtopigis siajn buŝojn kaj estis perfortitaj aŭskulti la polajn delegitojn aklami „vivu nia pola genio la doktoro Zamenhof!“.

La patro de Esperanto mem suferis multe pro sia judeco. Ja posedas li veran judan pornacian mondkoncepton, kaj bone konscias, ke lia judeco malprofitas al Esperanto. Unu el la vienaj „konsuloj“ de Esperanto, laŭnaske kaj laŭsange pura hungaro, sed amanto de Israelo kaj entuziasma adepto de Zamenhof, diris al la korespondanto de „Varhayt“⁹, ke la propagando favore al Esperanto multe suferas pro la fakto, ke Zamenhof estas judo. Multas tiuj — rakontis la konsulo — kiuj sin detenas de lernado de Esperanto kaj ties subteno, nure ĉar estas ĝi „juda afero“. Kaj d-ro Zamenhof ja konkludis el tiu ĉi malĝojiga fakto: jam dum la unua kunsido de la jubilea kongreso li deklaris, ke li eksiĝas de la laboro, ĉar per la paŝo de eksiĝo li kaŭzas profiton por la tuta afero...

Jen, tia estas la sorto de judo. Dudek kvin seninterrompajn jarojn penadis la

Paranoja Pollando

ILI NOMAS ĜIN leĝo pri „rita purigado”. En tiu lando de tradicie vigla katolikismo, tio ne estas sen forta signifo de pentado kaj pentofaro. Sepcent mil poloj devas do, laŭ tiu leĝo voĉdonita en oktobro 2006 kaj ekvalida la 15^{an} de marto 2007, konfesi ĉu ili kunlaboris kun la komunistoj inter 1945 kaj 1989. Ĉiuj altaj ofici-stoj, la profesoroj, la advokatoj, la direk-toroj de lernejoj kaj la ĵurnalistoj naskitaj antaŭ aŭgusto 1972 havas nun ĝis la 15^a de majo por konfesi sian „eraron”.

Ĉiuj devas plenigi formularon kaj respondi al la demando: „Ĉu vi kunlaboris sekrete kaj konscie kun la iamaj komuni-staj sekureservoj?” Ili devas redoni ĝin al sia hierarĥia superulo, kiu adresos ĝin al la Instituto de la Memoro, en Varso-vio. Tiu kontrolos en siaj arĥivoj kaj eldo-nos ateston pri „politika pureco”. Kaze de pruvita kunlaborado, la ĵurnalistoj kiuj laboras en publika servo estos aŭtomate maldungotaj. Tiuj kiuj rifuzos respondi, aŭ pri kiuj estos pruvite ke ili mensogis,



homo kaj enmetis la animon en la ideon, kaj kiam fortiĝis la amata filo kaj estiĝis sen-dependa, devigata estas la juda patro forlasi, ĉar eĉ se la patro kiom ajn granda ho-mo li eble estas — malgraŭ tio, eterne, estas nenio pli ol judo.

Traduko: Sergej Tyrin

¹ „La Esperantistoj Kunvene” — artikolo fare de B. Boroĥov, el la sepa (fakte temas pri la oka-trad.) espe-rantista kongreso en Krakovo, aperis en „Di Varhayt”, Nov-Jorko, 15^{an} de septembro 1912, sub la titolo „La juda demando en la kongreso de Esperanto”. Sekvante ĉi-artikolon, en „Varhayt” la 29^{an} de oktobro aperis la respondo de Ludoviko Zamenhof. Boroĥov reagis per „Respondo al respondo”, publikigita en „Di Varhayt” la 26^{an} de decembro 1912.

² La artikolo estis destinita por la gazeto „Di Varhayt”, kiu aperis en Usono.

³ La Jarlibro de UEA indikas 1000 aliĝintojn. Onidire, ankaŭ Lenin, kiu tiutempe troviĝis en Krakovo, vizitis la Kongreson por renkonti siajn kunulojn-socialistojn (trad.).

⁴ Ĉi tie kaj poste en la teksto la propraj nomoj aperas en Esperanta skribo (trad.).

⁵ „Volapük” — kripligita kunigo de la anglaj vortoj *world* (mondo) kaj *speak* (paroli).

⁶ La montoj Zakopane — en la okcidentaj Karpatoj, la tataro ĉeno — turisma kaj mond-sporta centro ĉe la sudo de Pollando, en regiono de Krakovo.

⁷ En la originalo en Esperanto, transliterumita kaj tradukita en la jidan (trad.).

⁸ Sufrajistinoj (en la angla „suffrage” — elekto-raĵto) — batalantinoj por la egaleco de rajtoj de la virinoj. Virina movado, komenciĝinta en Anglio en la dua duono de la 19^a jarcento kaj atinginta la pinton komen-ce de la 20^a jarcento.

⁹ La korespondanto de „Di Varhayt” — Ber Boroĥov.

riskas malpermeson praktiki sian profesion dum dek jaroj.

Tiu delira leĝo, kiu skandaligas la Eŭropan Union, reduktas la usonan makartiŝmon de la 1950^{aj} jaroj al amatora antikomunismo. Ĝi konsistigas la ĉefan rimedon de furioza sorĉistin-ĉasado lanĉita de la aŭtoritatoj ekde la enposteniĝo, en Pollando, en oktobro 2005, de la konservativa prezidanto Lech Kaczynski kaj de lia ĝemela frato Jaroslaw, ĉefministro.

Multegaj poloj juĝas tiun leĝon kontraŭa al la konstitucio, ĉar ĝi trudas al la civitanoj „pruvi ke ili ne faris tion kion ili ne faris”. Ĝi povus esti malvalidigita de la Konstitucia Kortumo, kiu esprimos sian verdikton komence de majo.

La koalicio de dekstro, katolika kaj nacia, kiu regas Polujon, konsistanta el tri partioj: Leĝo kaj Justico (de la fratoj Kaczynski), Memdefendo (de kamparanaj medioj) kaj la Ligo de Polaj Familioj, praktikas zorgigan politikon de energia reveno al la „morala ordo”. En tiu spirito, s-ro Roman Giertych, vica ĉefministro, ministro pri edukado kaj ĉefo de la Ligo de Polaj Familioj, ĵus deponis leĝproponon kontraŭ samseksemuloj kiu vekis kroman internacian indignokrion kaj protestojn de organizoj pri defendo de homrajtoj. Laŭ tiu projekto, kiu povus esti preta en monato, ĉiu homo kiu, en lerneja aŭ universitata establo, malkaŝus sian samseksemon „aŭ ian alian seksan devojiĝon”, elmetiĝus al monpuno, al maldungo aŭ al prizon-puno.

La patro de tiu ministro, s-ro Maciej Giertych, eŭropa deputito de la Ligo de Familioj, jam kaŭzis, lastan februaron, fulmotondron da kondamnoj post publikigi, je kostoj de la Eŭropa Parlamento kaj sub ties insigno, antisemitan

broŝuron en kiu li asertis, ekzemple, ke „la judoj kreas mem siajn getojn” kaj ke „la antisemitismo ne estas rasismo”.

Ĉar tiuj antikomunismaj purigaddecidoj kaj la klopodoj por reveni al aŭtoritata moralo kaŝas, en Pollando same kiel, malpli akre, en Ukrainio, Litovio kaj aliaj orientaj landoj, ian naŭzan nostalgion al la antaŭmilitaj periodoj, kiam la rasismo montriĝis fiere. Iuj, gajnitaj de la media reviziismo, jam eĉ ne hezitas glori la kunlaboradon kun la hitlera Tria Regno kontraŭ Sovetunio, kiu estas hodiaŭ oficiale figata.

Estas certe en tiu spirito, konsiderante — kiel tiom da komunikiloj — ke la Rusio de s-ro Vladimir Putin estas nur la maskita daŭrigo de la iama USSR, ke Varsovio deklaris sin favora al instalo sur sia teritorio de la antiraketa ŝildo konceptita de la Pentagono por protekti Usonon. Sen degni konsulti siajn partnerojn de la Eŭropa Unio, eĉ ne tiujn de la NATO. Kio montras ke, en politiko, la paranojo povas konduki ne nur al spirita atrofio. Sed ankaŭ al certa formo de perfido.

Ignacio RAMONET

Ignacio Ramonet naskiĝis en Redondela (Galicio, Hispanio) en 1943, elkreskis en Tangero (Maroko) kaj estas la direktoro, en Parizo, de la prestiĝa monatgazeto pri politikaj analizoj „Le Monde diplomatique”, la „gepatra” domo de ĝia Esperanta versio, „Le Monde diplomatique en Esperanto”. Li estas fakulo pri geopolitiko kaj internacia strategio, kaj profesoro pri komunikad-teorio ĉe la universitato Denis Diderot de Parizo. Li doktoriĝis pri semiologio kaj kulturhistorio ĉe la Lernejo de Altaj Studoj pri Sociaj

Sciencoj, kie li estis disĉiplo de Roland Barthes. Li estas fondinto de ATTAC kaj unu el la instigintoj de la Monda Socia Forumo. Li verkis plurajn librojn.

[red] Kiel eldonisto kaj posedanto de la Eldonejo HEJME mi estis devinta sendi per registrita letero alvokon al la redaktoro de PE (ankaŭ mi), plenigi kaj resendi al la Eldonejo menciitan formularon pri (ne)kunlaboro kun komunistaj sekurec-servoj. Kiel redaktoro mi estis devinta respondi al la Eldonejo, ankaŭ per registrita letero. La eldonisto (denove mi mem) ĝis la 15^a de majo estis devinta sendi la formularon al la Instituto de la Memoro...

Feliĉe, la 15^{an} de majo la Konstitucia Tribunalo agnoskis la leĝon malleĝa, kaj tiamaniere en mia buĝeto restis ĉ. 12 zlotoj. Sumo negranda, tamen...

Kiel juna esperantisto (antaŭ 30 jaroj) mi aktive kunlaboris kun komunismaj „instancoj”, nome: membroj de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio. Ĉiuj sciis, ke almenaŭ 4 personoj havis aŭ „oficialajn rilatojn” aŭ eĉ estis dungitoj de koncernaj sekurec-servoj. Tamen, se mi bone memoras, preskaŭ neniu esperantisto plendis pro tio, male, oni notis, ke danke al tiuj „rilatoj” PEA gajnas eblecojn pluekzisti, ricevi ŝtatan monsubtenon, eldonadi lernolibrojn, organizi kursojn, kongresojn, ktp. Tiuj, kiuj kontraŭstaris, devis forlasi PEA-n.

Skribante ĉi vortojn mi kontraŭstaras nek personojn, nek la ideon pri la necesa profunda ekkono de nia esperantista historio. Pri tio mi skribas ne la unuan fojon. Tamen, neniigi ĉion kaj ĉiujn, kiuj ne pensas same kiel „ni” estas obsede malbona kaj ni ne miru pri diversaj malfavoraj komentarioj, ankaŭ tiuj eksterlandaj. Ĉiuj havas la saman rajton libere esprimi siajn opiniojn, en libera Pollando kaj en libera Eŭropo.

Kazimierz Leja

Libera Folio

La buĉinto de Esperanto-redakcio suspendita

La Inspekta Konsilantaro de Pola Radio suspendis la estraranon de la radio Jerzy Targalski. La kaŭzo de la suspendo estis, ke Targalski laŭ la konsilantaro „ĝenis la publikan bildon de Pola Radio”. Inter esperantistoj Targalski estas aparte konata pro siaj eldiroj rilate la judan devenon de Zamenhof.

La Esperanto-redakcio de Pola Radio estis fermita interalie pro tio, ke Zamenhof estis judo. Tio iĝis evidenta en la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof, en la tago de la lasta esperantlingva elsendo de Pola Radio. Pli frue la estro de la redakcio, Barbara Pietrzak, diris nur, ke Jerzy Targalski prezentis „ideologiajn argumentojn”, kiam li transdonis al la redakcio la finan decidon pri la likvido. Poste montriĝis ke la „ideologia argumento” estis jena: se eĉ Israelo ne elsendas en Esperanto, kial do Pola Radio tion faru? Zamenhof ja estis pollandano, sed de juda deveno, li argumentis.

La prezidanto de la radia estraro, Krzysztof Czabański, poste nomis „malbonŝanca kaj malĝusta” la eldiron de Jerzy Targalski pri la juda deveno de Ludoviko Zamenhof. La eldiron de Targalski pri la deveno de Zamenhof siatempe kritike taksis ankaŭ la pola ministro de kulturo, Kazimierz Michał Ujazdowski. „Tio estas malsaĝa, malprudenta kaj malbona eldiro” diris Ujazdowski en intervjuo de alia radiostacio.

La eldiraĵo pri la judeco de Zamenhof ne estis la sola aŭ eĉ la ĉefa kialo de la

nuna suspendo. Sub la gvido de Targalski estis maldungita granda kvanto de dungitoj en Pola Radio, kaj lige kun tio li laŭ multaj maldungitoj kondukis en neakceptebla maniero.

Inter la maldungitoj estis ankaŭ la kunlaborantoj de la Esperanto-redakcio, el kiuj unu, Gabriela Kosiarska, estis tamen poste redungita por la retaj elsendoj. Neniu alia nun laboras en la Esperanto-redakcio aŭ oficiale kunlaboras kun ĝi.

En sia sabata numero la prestiĝa pola ĵurnalo *Gazeta Wyborcza* rakontas pri la suspendo de Jerzy Targalski en artikolo kun la titolo „Li ofendis, neglektis, humiligis”. Laŭ la gazeto, ekzemple ĵurnalisto Maria Szablowska aŭdis de Targalski, ke ŝi devas foriri ne nur, ĉar ŝi reprezentas „restaĵojn post Gierek kaj Gomułka”, sed ankaŭ pro tio, ke Targalski „ĉirkaŭe vidas nur maljunajn virinojn”.

Post la apero de la artikolo en *Gazeta Wyborcza* Jerzy Targalski anoncis, ke li intencas procesis kontraŭ la gazeto kaj postuli rekompencan de 150.000 zlotoj (ĉ. 40.000 eŭroj) por misfamigo.

Laŭ artikolo publikigita de la pola novaĝ-agentejo PAP, la kaŭzo de la suspendo estas „riproĉoj pri maldecaj elparoloj direktitaj al maldungitaj laboristoj de la Radio, kaj la ĝeno de bona bildo de la kompanio en socia percepto ligita kun tio”.

La Inspekta Konsilantaro nun decidis, ke Targalski devas esti suspendita ĝis oni klarigos la aferon. Tiucele aparta kunsido de la Konsilantaro estas planita je la 8 majo. Tiam estos aŭskultataj la laboristoj, kiuj anoncas, ke malbone traktis ilin Targalski, kaj Targalski mem. Pli frue Targalski estis vokita al la Komisiono de Etiko ĉe Pola Radio, sed li rifuzis veni.

Komitatoj de UEA elektitaj sen voĉdono

Pro malgranda interesiĝo pri la posteno, ne necesis voĉdono pri komitatoj B de UEA. Nur kvin kandidatoj sin anoncis por la elektado de komitatoj B, kiuj reprezentas la individuajn membrojn en la supera organo de UEA. Povis esti elektitaj sep komitatoj B. Ĉar estis malpli da kandidatoj ol postenoj, la kvin kandidatoj estas aŭtomate elektitaj kaj poŝta voĉdonado de membroj ne estas bezonata.

La kvin komitatoj B, kies oficperiodo komenciĝos je la unua tago de la 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, estas Marija Beloŝevic (Kroatio), Tomasz Chmielik (Pollando), Johan Derks (Nederlando), István Ertl (Luksemburgio) kaj Jukka Pietiläinen (Finnlando). Beloŝevic, Ertl kaj Pietiläinen membras ankaŭ en la nuna Komitato elektita en 2004. Chmielik kaj Derks eniros la Komitaton kiel novaj membroj.

Marija Beloŝevic (nask. 1965) estas konata i.a. kiel longtempa aktivulo kaj estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Tomasz Chmielik (1957) estas aktiva eldonisto kaj estrarano de Esperantlingva Verkista Asocio.

Johan Derks (1940) aktivas i.a. pri eŭropa agado kaj estis estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio.

István Ertl (1965) estas Esperanta verkisto kaj tradukisto kaj laboris dek jarojn kiel redaktoro de la revuo „Esperanto”.

D-ro Jukka Pietiläinen (1966) funkciis i.a. kiel prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj lastatempe kiel komisi-

to de UEA pri informado.

Laste la komitatanoj B estis elektitaj sen poŝta balotado en 1992. Kvan- kam en la antaŭa jaro UEA havis pli ol 8000 individuajn membrojn, unuafoje de 60 jaroj, por naŭ lokoj de komitatanoj B anonciĝis nur ok kandidatoj. En kvar po- stjaj fojoj okazis balotoj, en kiuj partopre- nis 30-33% de la individuaj membroj. Pri la ses lokoj de komitatanoj B en la nun deĵoranta Komitato konkursis antaŭ tri jaroj 16 kandidatoj. Voĉdonis tiam 1491 membroj, t.e. 31,4%.

[Laŭ gazetara komuniko de UEA]



La sekva prezidanto (?) volas reinventi UEA-n



Probal Dasgupta el Ba- rato kredeble estos la sekva prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. La dua prezid-pe- riodo de Renato Corset- ti finiĝos en la Jokohama

Universala Kongreso en aŭgusto, kaj ĝis nun ne aperis aliaj kandidatoj por la po- steno. Se li iĝos prezidanto, Probal Das- gupta volas, lernante de Gandhi, „re- inventi” Universalan Esperanto-Asocion en la komputila epoko. „Estas interese apudmeti la ideojn de Gandhi apud la tre malnova esperantuja debato inter la desupra kaj la desuba stiloj. Tradicie, niaj desuprismoj ekiras de la ŝtato, kaj niaj desubismoj kovas bildon de aparta, atoma unuopulo, kiu en soleco formu- las foje strangajn planojn. Ni longe sper- tis la tipajn frustruojn de tiuj metodoj”, li klarigas. La „reinventado” laŭ li ne signi-

fas, ke okazos tujaj drastaj ŝanĝoj, sed li esperas, ke estiĝos vasta diskuto kaj mul- taj kritikoj „de kiuj ni ĉiuj lernos”. Probal Dasgupta dum multaj jaroj estis profesoro pri aplika lingvistiko, kaj li estas kona- ta interalie pro siaj intelekta postulaĵ tek- stoj. „Mi sentime frontas la taskon labori por facila lingvo sed kun la reputacio de homo, kies tekstoj estas malfacilaj. Efek- tive, la facileco ne estas io facila”, li klari- gas al Libera Folio.

Probal Dasgupto instruis lingvistikon en tri barataj universitatoj. En la univer- sitato de Hajderabado, li estis direktoro (2000-06) de „Programo por Studi Bara- ton” por fremdaj studentoj, kiu sub li iĝis tutlande konata pioniraĵo pontofaranta inter eŭropaj/usonaj gejunuloj kaj la ba- rata universitata medio. Li estis en tiu universitato ankaŭ la dekanano pri hom- sciencoj (2001-04). Ekde aŭgusto 2006 li laboras en la Barata Statistika Institu- to. En la Esperanto-movado li aktivas de 1977. Pliaj informoj troveblas en Vikipe- dio.

Libera Folio: Kion vi volus entrepreni, al kio strebi, kion atingi dum via eventu- ala prezidanteco?

Probal Dasgupta: Mi volus entrepre- ni reinventon de la organizaĵo UEA – kaj de ĝiaj interpretoj de Esperanto kaj de la neŭtraleco – en la kunteksto de tiu re- liefigo de la personaj kapabloj, kiun pre- zentas al ni la reta epoko. Por prezenti ĉi tiun reinventan deziron, mi bezonas iom bildigi al vi mian vizion, kiu interalie do- nas grandan rolon al la kontinueco kaj la inkluzivemo rilate la malnovajn laborfa- denojn – kaj homojn.

Ĉi-rilate ni pensu pri ekzemplo el mia lando, Barato. En la unuaj jardekoj post la ekskoloniigo en 1947, preskaŭ ĉiuj

konsentis, ke la industriiga modelo de Nehru, kiu emfazis la strukturajn industriojn de ŝtalo, elektro ktp. kaj celis centri la fortostreĉojn, taŭgas al la krizaj bezonoj de longe suferinta lando volanta kreski. Sed post la alveno de la komputila epoko, la komputilaj dekokjaruloj komencis diri, ke nun, fine, ni povas reiri al la pli malcentrigaj kaj person-reliefigaj ideoj de Gandhi. La komputilo ne nur ebligas tion; ĝi eĉ kuraĝigas serioze trakti la personon kaj ties kapablojn kaj dezirojn. Same kiel la komputilaj geknaboj reinventis Baraton kaj remalkovris Gandhi, ŝajnas al mi, ke ni nun atingis similan momenton en la esperanta movado, kaj povas permesi al ni tian reinventon – kompreneble ne vere idente al la barata sperto, sed tamen pro similaj kialoj.

Mi mencias Gandhi aparte pro tio, ke li pensis ne nur pri la saltemaj junuloj, kiuj senĉese kultivas novajn ĝardenojn, sed ankaŭ pri la maljunaj veteranoj, kies kapablojn la komunumo scipovu optimume florigi kaj utiligi. Lia stilo atingi tiajn inkluzivemojn en la komunumo ĉiam enfokusigis la fakton, ke ĝuste la personoj scipovas doni kaj ricevi helpon kaj taksu la kapablojn unuj de la aliaj. La ŝtatoj kaj la komercaj firmaoj ne estas tiaj bestoj, ke la helpado iĝu konsistiga celo por ilia ekzisto. Zamenhof kreis Esperanton kiel helpan lingvon en ia klare perceptebla ligiteco kun lia ideo, ke la homoj estas reciproke helpemaj estuloj. (Eble la novelo de Tolstoj „Per kio la homoj vivas”, plej memorinde prezentas tiun ideon).

Estas interese apudmeti la ideojn de Gandhi apud la tre malnova esperantuja debato inter la desupra kaj la desuba stiloj. Tradicie, niaj desuprismoj ekiras de la ŝtato, kaj niaj desubismoj kovas bil-

don de aparta, atoma unuopulo, kiu en soleco formulas foje strangajn planojn. Ni longe spertis la tipajn frustruojn de tiuj metodoj. En Gandhi, la centro de la homa agado estas nek la tro ŝtona ŝtato nek la tro senforma individuo, sed la hejmo aŭ la familio. En tiu rilataro, la homo retrovas sin kiel unuavice rilatano, kiu kunkreas siajn komprenojn en kora ligo kun siaj samretanoj.

Mi diras „samretano” intence. Ni ja ne rajtas simple transpreni hodiaŭ la famiilismom de gandhi. Tiu rilatara nukleo, kiun hodiaŭa versio de lia ideo devus akcepti kiel novan centron, devas flekseble loki sin en la plej energia kaj sencohava vivejo. Por mi, tiu vivejo estas eventuale la tradicia nuklea familio. Por mia filo, ĝi estas iu ciberspaca grupo; kaj tiel plu. Nia lerno de Gandhi prenu la formon de rilatismo, kiu pro sia flekseblo kapablas daŭrigi kaj la desuprismajn kaj la desubismajn agadojn kaj kreas por ili novan kuntekston de interhelpo.

Laŭ mi, estas utile rigardi ĝuste la helpadon – la kreskigadon de la personaj kapabloj rilate al la plej riĉaj potencioj de ĉiu persono – kiel la temon de la esperanta ekzisto.

Ni devas kompreni, ke la helpado ekas jam en mi, en mia unua ago lerni la lingvon, en mia daŭra agado kultivi mian personan esperantan kapablaron.

Esperanto estas konsiste helpa lingvo; ĝia emfaza lerno-facileco ne estas simple instrumenta rimedo por iaj disvastigaj celoj; la temo de Esperanto estas ĝuste la faciligado, la helpado, por ĉiaj homaj aspiruoj. Kaj la loko, kie sin lanĉas la helpado, estas ĝuste tiu Gandhi-a rilatara nukleo (la familio aŭ la komputila komunika grupo aŭ iu alia sencohava ri-

latejo, en kiu mi trovas min plej aŭtente). La funkciado de la angla hodiaŭ aŭ de la franca hieraŭ ne scipovis tuŝi ĉi tiujn kla-vojn. Pro tio, Esperanto restas grava ho-ma agado eĉ en epoko, en kiu la angla estas vaste uzata kiel interlanda lingvo. Ni devas prezenti nin kiel movadon por la homa edukigo, en kiu la interhelpo akceptiĝas kiel io difina pri la homeco.

Antaŭa generacio volis ligi Esperan-ton al la homaj rajtoj. La rajtoj estas io necesa sed ne sufiĉa. Batali por niaj raj-toj estas devigi ŝanĝojn ĉe homoj, kiuj ri-fuzas doni al ni la minimumojn, kiujn ili ŝuldas al ni. Sed Esperanto devas labori ne nur por la minimumoj, sed ankaŭ por la vera florado de la homaj potencialoj. Ni devas demandi nin, kiaj inspiroj stimu-las la interhelpadon en riĉa homara vivo. Temos do pri povigoj, kiuj preteriras nian iaman – kaj pravan – deziron devigi, ke la imperiestroj cedu al ni la minimuman ek-zistorajton.

Libera Folio: Kiajn pensojn vi havas pri la rolo de la komitato kaj pri la mal-fermeco de la estraro al la komitato kaj al la membraro?

Probal Dasgupta: La rilato inter la es-traro de UEA, la komitato, la kongresoj kaj la vivoj de niaj landaj asocioj kaj indi-viduaj membroj laŭ mi estas io intertrak-tenda en la plena riĉeco de nia nova kun-teksto. UEA ne estas farita por vivi en la reta epoko, sed niaj vivoj ankaŭ en UEA grandparte funkcias en tiu epoko. Ni de-vas reforĝi niajn rilatojn en tiu kuntek-sto sen forĵeto de niaj multaj lernoj, kiuj kunportas la odoron de diversaj tavoloj de nia riĉa arkeologio. Ni havas struktu-ran respondecon al la tuta esperanta ko-munumo – kaj respondecon al la ekste-rasperanta mondo, prezenti Esperanton

kiel kernan ideon de la homeco kapablan kontraŭstari la tendencon al la perforto. UEA estas ĉefe struktura organizaĵo, kiu maksimumigas sian kapablon povigi. Tiu maksimumigado jam okazas, kaj mi pro-vos laŭeble daŭrigi tiun procezon.

Libera Folio: Pli konkrete, ĉu sub via prezidado oni anticipu publikigos la ta-gordojn de estraraj kunsidoj? Ĉu oni pu-blikigos ĉiujn decidojn de la estraro? Kion vi opinias pri la diskuto ĉirkaŭ la publikeco de la estraraj protokoloj?

Probal Dasgupta: Rilate la malkaŝecon – se ni ĉesos bazi niajn iniciatojn kaj for-matojn sur diversaj timoj (ĉu ni estas tro malgranda movado? ĉu la homoj ha-vas erarajn ideojn pri ni? ĉu ni pereos? ĉu ni kaŝu de la homoj la artefaritecon de Esperanto, aŭ almenaŭ fonigu ĝin, aŭ almenaŭ emfazu la naturecon de la lingvo? kaj tiel plu), ni ĉesos deziri kaŝi niajn interkonsiliĝojn. Kaj tiam ne neces-os apartaj fortostreĉoj por devigi diver-sajn instancojn aspekti malfermaj.

Libera Folio: Bone, sed tamen, kiel vi persone opinias, ke tiu „aspekti malfer-maj” funkcii praktike? Tute konkrete, ĉu oni anticipu rajtos scii, kiaj demandoj estos traktitaj en la estraraj kunsidoj? Ĉu oni tuj diskonigos ĉiujn decidojn de la estraro? Ĉu la nova estraro laŭ via su-povo povus akcepti iajn formalajn (sin) devigojn tiurilate?

Probal Dasgupta: Mi ne povas fa-ri promesojn tuj, por la tagordo-infor-ma kaj raporta sistemo, sed mi ja reko-nas, ke tiuj demandoj, kiujn ĉi tie levas vi kaj kiujn kun pluraj aldonoj levis aliaj en la pasinteco, estas gravaj kaj atentin-daj. Ĉiu tagordo enhavas la eron „aliaj tagorderoj”, kaj necesas tie akcepti kaj trakti demandojn, kies leviĝon oni ne

antaŭvidis en la momento de la dissendo de kunsida tagordo.

Se la estraro sukcesos resti engaĝita pri la demandoj per la regula reta kontakto, la premo sur la estrarajn kunsidojn iĝos malpli forta. Mi havas sperton pri la Akademio de Esperanto kaj pri la Internacia Ekzamena Komisiono, kie la skriba kaj reta kontakta vojo sufiĉas por atingi sufiĉe gravajn decidojn sen fizikaj kunsidoj. Tiu sperto konvinkas min, ke ni atingos multon ankaŭ ekster la kunsidoj; necesos do difini avertan kaj informan strategiaron, por ke la enmetojn kaj rezultojn de la reta konsiliĝado povu scii tiuj, kiujn la diskutoj tuŝas.

Libera Folio: Ĉu vi entreprenos iujn specifajn konkretajn paŝojn dum via unua jaro, se vi estos elektita prezidanto?

Probal Dasgupta: Mi nesufiĉe bone konas la laboran sistemon de la UEA-maŝino por povi fari konkretajn planojn. Mi devos konsiliĝi kun aliaj estraranoj pri tio. Mi konas la principojn, sed ne havas ĝisdatan sperton pri la ĉiusemajna labora situacio. Mi iam havis prian sperton, sed tio estis antaŭ la komputila epoko. Mi preferas ensalti sen konkretaj planoj pri munto kaj malmunto de specifaj funkciaĵoj, kaj lasi tiajn planojn elveni el la diskutoj.

Libera Folio: Ĉu vi sentas ke vi havas subtenon por viaj ideoj inter aliaj estraraj kandidatoj?

Probal Dasgupta: Mi kredas, ke mi povos ilin relative facile vendi, kvankam mi ne diskutis ilin antaŭe – kaj kvankam ili tute ne identas al la pakaĵo „ni vivas per la reciproka gastigado”, kiun prezentadis miaj iamaj tekstoj. Se ne, iuj el miaj ideoj restos en la ĉirkaŭa vizio, kaj aliajn

oni povos traduki en konkretajn paŝojn. Ankaŭ vizio, el kiu nur iuj ideoj estas plenumataj, povas havi utilajn efikojn per sia ĉeesto kaj diskutateco.

Sonas kiel granda kaj drasta plano, tute utopia kaj nerealigebla. Mi kredas, ke se ni sentime provos prezenti ĝin kiel nian deziron, tiam tiu parto de la deziro, kiu estas efektivegebla, komencos efektiviĝi. Mi certe ne atendas lanĉi procezon, kiu havos draste tujajn rezultojn ene de tri jaroj. Mi atendas vastan diskuton, kaj multegajn kritikojn, de kiuj ni ĉiuj lernos.

Mi sentime frontas la taskon labori por facila lingvo sed kun la reputacio de homo, kies tekstoj estas malfacilaj. Efektive, la facileco ne estas io facila. Estis ege malfacile krei facilan lingvon, kaj ĝuste tial Zamenhof sukcesis, kie fiaskis tiomege multaj. Estas same malfacile ĝuste loki nian facilan klavon sur la mondan mapon. Kun ĉies helpo, mi tamen esperas sukcesi.



La estraro de UEA decidis kongresi en Pollando kaj sekretigi siajn protokolojn

La Universala Kongreso de Esperanto en 2009 okazos en Pollando. Tion decidis la estraro de UEA dum sia kunsido en Roterdamo de la 13a ĝis la 15a de aprilo. La estraro aparte diskutis la publikecon de siaj protokoloj, kaj „notis, ke pri informado al la Komitato validas paraĝrafoj en la statuto kaj regularo, kaj ke la estraraj protokoloj ĝenerale ne estas publikaj”. Tiu frazo en la estrara komunikado al la komitato estas iom enigma, ĉar jam

en 1973 la estraro de UEA decidis „nuligi la konfidencecon de la estraraj diskutoj antaŭ la Komitato kun escepto de unuopaj decidoj, kiuj pro specialaj kaŭzoj, precipe personaj, postulas konfidencecon”. Laŭ respondo de Renato Corsetti al demando de Libera Folio, la estaro nun malvalidigis tiun decidon. Ni publikigas la kompletan tekston de la estara komuniko sendita al la komitato.

La estraro de UEA kunsidis en Rotterdama la 13-15 aprilo. La diskutoj temis pri ĉiuj flankoj de la estrara laboro: informado interne kaj al ekstero, kulturo, instruado, landa kaj regiona agado, membraro, kongresoj de la nuna kaj proksimaj jaroj, junulara agado, financoj.

Decidoj faritaj temis plejparte pri preparoj por estonta agado, kvankam ja estas elektojaro, kaj estos nova estraro post la proksima kongreso. Preparoj por la kongreso en Jokohamo estas respondecado de la nuna estraro, kaj necesas multaj decidoj pri programoj kaj kunsidoj, inter alie preparo de tagordo por la kunveno de la Komitato. Pri la posta jaro, kongreso en Rotterdama, la estraro decidis pri nomoj de loka kongresa komitato.

- En la jaro 2009 okazos universala kongreso (UK) en Pollando, laŭ principa decido de la estraro, pri kiu vi legos per la Gazetara Servo.
- La nova revuo *Beletra Almanako*, eldonata de Mondial, proponis publikigi premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj, kaj la estraro decidis akcepti tiun proponon.
- ILEI ricevos subvencion por sia laboro en la kampo de instruado laŭ la valida interkonsento.
- La estraro invitos al vi fari proponojn

por kongresa temo por la jaro 2008.

Decidoj faritaj rete de post la kongreso en Florenco estis konfirmitaj. Ili temis pri konsisto de juĝantaro de branĉo poezio de Belartaj Konkursoj, nomumo de komisiito pri IIK, pluraj nomumoj de ĉefdelegitoj kaj perantoj, nomumo de reĝisoro de la kongresa temo 2007, nomumo de komisiito pri traktado de eksteraj subvencioj, temoj por la oratoria konkurso, nova redaktanto de revuo Kontakto, kaj lastatempe pri IKU- prelegoj 2007 kaj neformalaj provizoraj decidoj pri la Amerika Komisiono kaj Rondo Familia Komisiono (provizoraj pro mallonga daŭro da validaj ĝis post la elektoj en la kongreso). Mi petas pardonon pro la prokrasto de informo al la komitatoj. Grandparte la informo okazis rekte al la koncernaj diskutlistoj aŭ pere de la Gazetara Servo de UEA. La estraro notis, ke pri informado al la Komitato validas paragrafoj en la statuto kaj regularo, kaj ke la estraraj protokoloj ĝenerale ne estas publikaj.

Decidoj faritaj dum la kongreso en Florenco 2006 ĉefe temis pri dumkongresaj aranĝoj kaj pri proponoj farotaj al la Komitato, kio jam okazis. Krome pluraj diskutoj dum la estraraj kunsidoj en Florenco estis preparoj por posta agado de la unuopaj estraranoj, kaj decidoj okazis post plia interŝanĝo de retleteroj dum la fino de la jaro. Same estis pri la neformala teknika kunsido de kelkaj el la estraranoj en novembro 2006, kie la ĉeestantaj estraranoj diskutis pri multaj flankoj de la agado, se ne necesis decidoj de la tuta estraro, aŭ decidoj devis esti faritaj per retleteroj.

La estraro dissendos tagordon por la komitata kunveno, kune kun provizo-

ra raporto de la Elekta Komisiono kaj komentoj pri plenumo de decidoj faritaj de la Komitato en Florenco, al la komitata-
noj en la proksimaj tagoj.

Kun koraj salutoj al vi ĉiuj,

Ulla Luin

Ĝenerala sekretari(in)o de UEA

Rusianoj pretas kongresi en Moskvo sen UEA

La decido de UEA ne aranĝi la Universalan Kongreson en Moskvo en la jaro 2009 kaŭzis akrajn disputojn interne de Rusia Esperanto-Unio. Krome REU sendis al UEA kritikan leteron, en kiu UEA estas akuzata pri neglektado de la proponoj de REU. La letero estis tiel akratona, ke la prezidanto de REU, Andrej Grigorjevskij, rifuzis subskribi ĝin. Anstataŭe ĝin nome de la estraro subskribis la vicprezidanto de REU, Nikolaj Gudskov. REU-anoj ankaŭ ekdiskutis la ideon organizi propran internacian kongreson honore al „nia fama samlandano”, Ludoviko Zamenhof.

En marto Rusia Esperanto-Unio diskonigis informon pri entuziasma subteno de la Moskva urba registaro al la propono okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Moskvo. La subteno estis atingita post intensa laboro de esperantistoj, kaj vekis el Rusio la esperon, ke unuafoje en la historio Universal Kongreso povus okazi tie.

Responde al demando de *Libera Folio*, la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, tiam replikis, ke jam estas tro malfrue konsideri Moskvon por tiu jaro. Tuj poste la landa kongreso de REU faris formalan decidon, ke la Universal Kongreso tamen estu invitita al Moskvo, por la

jaro 2009 aŭ 2010.

Meze de aprilo la estraro de UEA kunsidis en Roterdamo, kaj faris principan decidon, laŭ kiu la jubilea Universal Kongreso en la jaro 2009, la jaro de la 150^a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, okazos ne en Rusio, sed en Pollando. Tiu decido forte iritis kelkajn el la gvidantoj de REU, kiuj diris, ke la estraro de UEA promesis ne fari decidon pri la afero antaŭ la ĉi-jara UK en Jokohamo. Estraranojn de REU aparte iritis, ke ili ne ricevis rektan, oficialan respondon de UEA al sia propono pri kongreso en Moskvo.

En la diskutlisto de REU, la prezidanto Andrej Grigorjevskij opiniis, ke UEA ja donis klaran respondon:

— Laŭ mia supozo, okazas interkultura malinterkompreniĝo. Vidpunkte de okcidentanoj ili tre klare, sed ŝpareme por nia psiko kaj memo respondis. Kiam ili respondis, ke ne eblas esplori nian varianton por 2009 kaj multajn aliajn aferojn — tio iliavidpunkte estas tre diplomatia, sed malambigua neo (pri 2009). Sed ĉar ni ne kutimas al tia delikateco, ni ne komprenas.

Aliaj aktivuloj ne konsentis pri tia interpreto, sed opiniis, ke UEA intence balais subtapiŝen la demandon pri kongreso en Rusio. Laŭ vic-prezidanto Nikolaj Gudskov, ne ĉiuj gvidantoj de UEA estas entuziasmaj pri kongreso en Rusio.

— Iu(j) el la estraro — eble, jes. Sed s-ro Buller eĉ ne ekinteresiĝis. Kaj de li, kiel evidentiĝis, ĉio dependas — ne de la estraro, prezidanto, kaj ceteraj sensignifaj personoj.

Je tiu punkto en la diskuton enmiksiĝis ankaŭ Renato Corsetti, kiu atentigis, ke la estraro de UEA ne havis ion konkretan, pri kio diskuti.

— Kara Nikolao, la estraro, prezidanto kaj ceteraj sensignifaj personoj fakte ĉefe okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto. Ili tamen eĉ diskutus pri la rusa propono por UK, se ĝi venus.

Sekvinte la ĉiam pli intensan internan diskuton de REU, Renato Corsetti revenis al la temo:

— Kial insisti ke la UK en Rusujo okazu en 2009, kio evidente estas malebla, kaj ne labori por ke ĝi okazu en postaj jaroj, kiel la decido de REU tekstas?

Laŭ vortoj de Nikolaj Gudskov, vicprezidanto de REU, adresitaj al Renato Corsetti, la traktado de tuta afero kaŭzis krizon en REU. Sekve de la afero REU sendis al Renato Corsetti kritikan leteron, kiun pro ĝia akreco tamen rifuzis subskribi Andrej Grigorjevskij, la prezidanto de la asocio. Anstataŭe subskribis ĝin Nikolaj Gudskov.

— Viaj vortoj nun nur profundigas la krizon en REU [...] kaj malfidon de rusiaj esperantistoj al UEA, kiel organizo, kiu kapablas plene neglekti la proponojn de siaj landaj asocioj. Mi esperas, ke vi ne forĵetos leteron, kiun mi al vi sendas hodiaŭ, sed traktos ĝin aŭ persone, aŭ transdonos ĝin senprokraste al via posteulo. Ĉiuokaze, ni esperas, ke niaj proponoj ne plu restos senrespondaj kaj/aŭ senbaze neglektataj, skribis Nikolaj Gudskov en publika mesaĝo al Renato Corsetti.

En la diskutejo de REU ricevis subtenon la ideo aranĝi internacian Esperanto-kongreson en Moskvo sendepende de UEA, se UEA plu ne montrus interesigon pri la proponoj de REU.

Ses novaj akademianoj elektitaj

Ĉiun trian jaron unu triono el la 45 anoj de Akademio de Esperanto eliras, kaj estas elektata nova aro de Akademianoj por anstataŭi ilin. En la ĉi-jara elekto estis reelektitaj 9 membroj de la Akademio, kaj alektitaj 6 novaj Akademianoj.

Ĉiu nova membro devis esti proponita de almenaŭ kvin ekzistantaj Akademianoj.

La fina elekta proceduro de la Akademio de Esperanto okazis dum la printempo per paperpoŝta voĉdonado, kiel okazas ĉiun trian jaron por triono de la Akademio, laŭ la statuto. Nun sekvas la elekto de la funkciuloj (prezidanto, du vicprezidantoj, sekretario, direktoroj de la sekcioj).

La interna cirkulero de la Akademio, informanta pri la rezultoj de la elektoj, estis datita la 19^{an} de aprilo. Por naŭjara oficperiodo estis laŭ ĝi nun elektitaj aŭ reelektitaj la jenaj personoj, konsistigantaj unu trionon de la akademianoj:

Gerrit Berveling (reelekto)

Renato Corsetti (reelekto)

Paul Gubbins (nova)

Christer Kiselman (reelekto)

Ilona Koutny (reelekto)

Katalin Kováts (nova)

Jouko Lindstedt (reelekto)

François Lo Jacomo (reelekto)

Mauro La Torre (nova)

Geraldo Mattos (reelekto)

Brian Moon (reelekto)

Ma Young-tae (nova)

Barbara Pietrzak (nova)

Baldur Ragnarsson (reelekto)

Saka Tadasí (nova)

Selten pri Esperanto en la EU-parlamento

Pro la Tago de Eŭropo la 9^{an} de majo, dek tri nobelpremiitoj estis invititaj en la Eŭropan Parlamenton. Inter ili troviĝis la esperantisto Reinhard Selten. Li estis prezentita de la prezidanto de la Parlamento kiel esperantisto, kaj li mem levvis la demandon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto dum sia parolado. Laŭ li, kelkaj interesitaj EU-landoj povus komune interkonsenti pri lerneja instruado de Esperanto, kaj pliaj landoj povus aldoniĝi poste. „La lingvo estas grava parto en la evoluigo de eŭropa identeco. Nun ne ekzistas taga gazeto, kiun oni legus ĉie en Eŭropo”, diris Selten. La 16^{an} de majo la Eŭropa Parlamento publikigis filmeton pri la vizito de la Nobel-premiitoj. La filmo ekzistas nur en la angla lingvo, kaj la plej grandan spacon ricevas anglalingvaj Nobel-premiitoj.

Laŭ la unua oficiala komuniko de EU Reinhard Selten emfazis la rapidan ekonomian integriĝon de Eŭropo en la lastaj kvindek jaroj kaj diris ke la sukceso de la mona unuiĝo estis „io neimagebla”. Grandparte tio laŭ li ŝuldiĝas al „la sendependeco kaj engaĝiĝo de la Eŭropa Centra Banko”.

Poste Reinhard Selten konstatis, ke la ekonomia integriĝo ankoraŭ ne estas kompleta, kaj laŭ li, por tio oni unue devus lerni „sin senti eŭropanoj”. La ĉefa problemo rilate tion laŭ li troviĝas en la lingva baro, kaj necesas solvo longperspektiva kaj justa.

— Neniu lando rajtas malgajni, li opiniis.

Do, neniu lingvo laŭ Reinhard Selten devus havi superecon super alia. Konse-

kvence, li alvokis al la lernado kaj uzo de Esperanto. Laŭ Selten, temas pri lingvo „facile lernebla” kaj li proponis ke en la landoj de la EU oni studu Esperanton kiel la unuan lingvon.

— Kelkaj landoj povus komenci la instruadon kiel pilot-projekton, kaj poste aliaj landoj povus sekvi, proksimume kiel okazis pri la Schengen-kunlaboro kaj pri la mon-unio, li proponis, laŭ la sveda versio de la oficiala komuniko.

Laŭ Hannariikka Nieminen ĉe la gazetara servo de la Eŭropa Parlamento, skriba versio de la parolado de Reinhard Selten ne haveblas. Ŝi mem aŭskultis la paroladon, kaj laŭ ŝi Reinhard Selten „tre entuziasme” argumentis por Esperanto.

Pri Esperanto Reinhard Selten laŭ ŝi diris, ke interesitaj landoj povus fari interkonsenton pri instruado de Esperanto, kaj aliaj landoj povus aliĝi poste, same kiel pri la Schengen-interkonsento kaj la komuna mono. Kvankam la hispanlingva gazetara komuniko povis ŝajni aludi ion alian, Selten efektive diris, ke Esperanton indus ekstudi kiel la unuan fremdan lingvon, rakontis Hannariikka Nieminen al *Libera Folio* la 15^{an} de majo.

— La lingvo estas grava parto en la evoluigo de eŭropa identeco. Nun ne ekzistas taga gazeto, kiun oni legus ĉie en Eŭropo, konkludis Reinhard Selten intervuon, kiu aperis en la retejo de Eŭropa Parlamento la 16an de majo.

Lige kun la plurlingvaj intervjuoj de la Nobel-premiitoj, la Eŭropa Parlamento la 16-an de majo publikigis ankaŭ kvinminutan filmeton, kiu estas nur anglalingva. En ĝi la plej grandan spacon ricevas anglalingvaj Nobel-premiitoj. Reinhard Selten estas montrata kelkajn sekundojn, kaj rajtas diri kelkajn vortojn pri la gra-

veco de komuna eŭropa identeco — en angla lingvo kun forta germana akĉento. Mencio pri Esperanto ne aŭdiĝas en la filmeto.



UN deklaras 2008 internacia jaro de lingvoj

Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2008 internacia jaro de lingvoj. Laŭ gazetara komunikado de UN, ene de la organizaĵo temas ĉefe pri la egaleca traktado de la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj ke oni interalie prioritatu la tradukon de ĉiuj gravaj dokumentoj al tiuj lingvoj. Tamen la komunikado ankaŭ akcentas la gravecon provizi teknikan helpon kaj edukadon en la lokaj lingvoj de la helpataj landoj. Ni publikigas tradukon de la gazetara komunikado de UN, faritan de Don Harlow.

ĜENERALA ASEMBLEO PROKLAMAS JARON 2008 INTERNACIA JARO DE LINGVOJ, KIEL PROVO AKCELI UNUECON EN DIVERSECO, TUTMONDAN INTERKOMPRENON.

La Ĝenerala Asembleo ĉi-posttagmeze, rekonante, ke vera plurlingvismo akcelas unuecon en diverseco kaj internacian interkomprenon, proklamis jaron 2008 la Internacia Jaro de Lingvoj.

Agante sen balotado, la Asembleo, ankaŭ rekonante, ke la Unuiĝintaj Nacioj subtenas plurlingvismon kiel rimedon por tutmonde akceli, protekti kaj konservi diversecon de lingvoj kaj kulturoj, emfazis la gravecon super ĉio de la egaleco de la ses oficialaj lingvoj (la araba, la ĉina, la angla, la franca, la rusa kaj la hispana) de la organizaĵo.

Tiurilate, la Asembleo petis, ke la Ĝenerala Sekretario certigu, ke ĉiuj lin-

gvaj servoj ricevu egalecan traktadon kaj ke ilin oni provizu per egale favoraj laborkondiĉoj kaj rimedoj. Oni cetere petis, ke la Ĝenerala Sekretario prioritante finu la taskon aperigi ĉiujn gravajn pli malnovajn dokumentojn de Unuiĝintaj Nacioj ĉe la TTTejo de la Organizaĵo en ĉiuj ses oficialaj lingvoj.

La Asembleo cetere emfazis la gravecon konvene uzadi ĉiujn oficialajn lingvojn en ĉiuj agadoj de la Fako pri Publika Informado, cele al forigo de la malegaleco inter la uzado de la angla kaj la uzado de la kvin ceteraj oficialaj lingvoj.

Prezentante la rezolucion (en dokumento A/61/L.56), la reprezentanto de Francio diris, ke la teksto certigos „tutmondan” aliron al plurlingvismo kaj akcelos konvenan vizon de plurlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi helpas certigi obeadon al la principoj de plurlingvismo en la ĉiutagaj agadoj de la Organizaĵo kaj, la unuan fojon, substrekos la gravecon provizi teĥnikan helpon kaj edukadon en la lokaj lingvoj de helpataj landoj.

Parolantoj, inter ili la reprezentantoj de Tunizio, Andoro, la Rusa Federacio, Rumanio kaj Senegalio, emfazis, ke plurlingvismo en la Unuiĝintaj Nacioj servas por riĉigi la laboradon de la Organizaĵo. Lingva diverseco estas la fundamento de kultura diverseco. Sen taŭga atento al la afero pri konservado de lingva diverseco, la harmonia integrigado de ĉiam pli multaj landoj en la praktika laborado de la Organizaĵo preskaŭ ne eblus.

Ili bonvenigis la laboron de la Fako pri Publika Informado rilate plurlingvismon en elektronikaj rimedoj, cetere tiun de la informcentroj de Unuiĝintaj Nacioj (UNICoj) rilate diskonigadon de informoj pere de lokaj lingvoj. Kelkaj parolantoj

esperis, ke la posta rezolucio pri plurlingvismo enhavos eksplacitan mencion pri la bezono de lingva diverseco en pacigaj funkcioj.

La Asembleon oni informis, ke ĉiujn implicojn pri rimedoj rezultantaj de la rezolucio oni pritraktos en la raporto de la Ĝenerala Sekretario al la sesdek-tria sesio de la Asembleo pri plenumo de la rezolucio.

Traduko: Don Harlow



Kiam temas pri fremdaj lingvoj, ni ĉiuj iĝas masohistoj!

Claude Piron intervjuita de Abruza tagĵurnalo

La 1^{an} de septembro Abruzzo Oggi (Abruzzo Hodiaŭ) intervjuis eminentan fakulon pri internacia komunikado, nome Claude Piron el Ĝenevo, rilate al lingvaj problemoj internacikampe. Dum jaroj li estis tradukisto por la Internaciaj Agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj, poste li ekokupiĝis pri internacia kaj interhoma komunikado ĉe Psikologia Fakultato de Universitato en Ĝenevo.

La abruza tagĵurnalo, kies direktoro estas Vittorio Mangione, tre atenteme prikonsideras la aktualan situacion rilate al problemoj de lingva kaj kultura defendado, kio, male, estas tute subtaksata de la nacia gazetaro kaj amaskomunikiloj.

Klare okulfrapas en tiu intervjuo tiu estiĝanta situacio, kiun oni povas difini kiel „masohisman” flankon de nia socio. La nuntempa sistemo de internacia komunikado spegulus la negativajn karakterizojn de la homa socio, kiel ties masohismon, ties emon agadi tute mal-

racie, la forton de ĝia inertece kaj la rifuzon alfronti la realon. Nia socio, diras Piron, elektis por komunikadi unu el la lingvoj malpli taŭgaj por internacia uzado, nome la anglan, lingvon malfacilan eĉ por la denaskuloj mem de anglosaksaj landoj. Verdire ne temis pri libera elekto, ĉar ja estis tiu inertece forto kiu antaŭen trenadas. 95% de la homaro rezignacie akceptas sian lingve subigitan pozicion, dum la ceteraj 5 procentoj, konsistantaj el denaskaj anglaparolantoj, konsideras tute natura la fakton ke ĉiuj ali-lingvuloj surprenu la taskon, penadi por ebligi interkomunikadon. Eĉ pli: penadi, konsciiĝante pri la ĉiam pli evidenta defalo de la propra lingvo.

Pri instruado de lingvoj en lernejoj oni entute ne debatas. Ĉies atenton oni kaptas iluziante, ke la angla lingvo solvos la lingvan problemon en la mondo kaj ke ĝin, kiel komunikilon, eblas elstudi lerneje. Piron proponas, ke oni rekomendu al civitanoj lerni Esperanton, ĉar eblas relative rapidmaniere disponi je plaĉe efika metodo por komuniki kun parolantoj de aliaj lingvoj kaj ke en lernejoj oni eklernu lingvojn, ne konsiderante ilin kiel nurajn instrumentojn de komunikado, sed kiel kulturalan pliriĝadon, survoje al tuthomara interkompreniĝado. Absurdas, ke en la mondo nuntempa 90-procenta studentaro el superaj lernejoj elspedas tiom da energioj por lerni la anglan lingvon, ignorante ĉiujn aliajn kulturojn kiujn oni povas aliri per lingvaj kursoj. Kaj eĉ pli absurdas, ĉar, post tiu penado, la plejparto ne estas en la kondiĉoj interkomuniki reale kaj samnivele sur la tutmonda tereno.

Esperable, daŭrigas Piron, la nuna situacio ĉe EU, kun ties novaj membroŝtatoj kaj sekve kromaj lingvoj, eviden-

tigos la neceson serioze ekzameni ĉi problemon, sed eble mankos la kuraĝo starigi la bazajn demandojn. Bedaŭrinde la homoj estas konservativaj: ŝanĝi la aktualan lingvan ordon (aŭ pli bone la mallordon) signifas ŝanĝi pensmanieron kaj tiu ŝanĝiĝo estas „ago psike costa”, kiel asertas Janet.

Esperanto, ĉiukaze, povas utili en la lernejoj danke al sia propedeŭtika valoro, tial ankaŭ por lerni aliajn lingvojn. Nur unu afero tamen esence malhelpas la utiligon de Esperanto, kiel planlingvo: la senbaze asertita manko de kulturo.

Tiun ĉi tezon firme subtenis la Eŭropa Komisiito pri plurlingvismo, Jan Figel, por forŝovi Esperanton el sia raporto. Ke tio estis proksimuma stultaĵo, pretekstita de kiu tute ne emas aŭskulti eĉ ne ioman diskuton pri la superregado de la angla, estas klara al ĉiuj, escepte de Figel mem.

Tamen, ene de Eŭropa Unio, oni ne nur argumentadas pri temoj kiel amikeco aŭ nespecifaĵoj, sed ankaŭ pri pli komplikaj situacioj, ĉu ekonomiaj, ĉu juraj aŭ teknikaj. Do, eligas problemoj pri faka terminologio. Pri ĉi praktika problemo neniu parolas, respondante al tio plejfoje per kutimaj banalaĵoj. Piron opinias, ke ja la problemo ekzistas kaj ke serioze ĝi devas esti pritraktata, sed tamen ĝi estas solvebla pere de teknikoj de lingva planado kiujn oni jam alprenis por naciaj lingvoj kiel la estona, kaj kiuj ebligis al la hebrea, havanta nur 5 mil vortojn, fariĝi moderna lingvaĵo.

La reala problemo estas naski ĉe la publiko, kaj sekve ĉe la politikistaro, pli grandan respekton al propra lingvo kaj pli grandan atenton al internacia lingva problemo, per disvastigado de la ideo de

lingva demokratio kaj, precipe en la anglosaksa mondo, pri novtipa kulturo de kompreno kaj kompreniĝo. Devige estas kompreni la bazajn konceptojn de lingva demokratio kaj de homaj rajtoj en tiu ĉi kampo.

Nepras ke ĉiam pli da personoj konsciĝu pri la defendendaj kulturaj valoroj, antaŭ ol tiuj lingvaj, kaj ke oni kontraŭstaru, antaŭ ol ili estu senrimede endanĝerigitaj. Daŭrigi, intertempe, je superaj niveloj, rifuzi la solvon „Esperanto”, sen scio pri ties potencialoj, ŝajnas eĉ tro absurda por esti akceptita.

Ĉi tiuj lastaj konceptoj, eldiritaj de Piron, trovis plenan konsenton ĉe la intervjuinto, Giorgio Bronzetti, kunordiganto de Asocio Allarme Lingua (Alarmo Lingvo), kiu klopodas favore al defendado de la lingvoj, unualoke de la itala, kaj de la kulturoj, endanĝerigitaj de la sintrudemo de la angla lingvo kaj anglo-usona kulturo. Fakte ne plu temas pri protektado de okcitanaj minoritatoj en la regiono Piemonto kontraŭ la itala lingvo, sed la batallinio nuntempe alturniĝis al defendado de la pluvivado de la italaj lingvoj kaj kulturo. Kiu kredas, ke ankoraŭ legindas Dante Alighieri en ĉiuj lernejoj dum la venontaj jaroj, tiu certe samopinias kun Piron kaj „Alarme Lingua”.

Trad. Elda Doerfler

Renato Corsetti

Università La Sapienza di Roma

Disvastigo — gazetara agentejo por diskonigo de novaĵoj, artikoloj kaj dokumentoj pri problemoj de internacia lingva komunikado, interlingvistiko kaj esperantologio.

Ĉi tiun bultenon oni sendas al abonantoj de DISVASTIGO. Pliajn informojn oni povas ricevi de info613@disvastigo.it al kiu oni povas turni sin por aliĝi aŭ malaliĝi.

La avantaĝoj de urbĝemeliĝo per Esperanto

Eble ne ĉiuj scias, ke en marto 2005 la urbestroj de Herzberg (germana urbe-to apud Hanovro) kaj de Góra (Pollando) renkontiĝis kaj surbaze de decido de la respektivaj urbaj konsilantaroj — deklar- is la du urbojn ĝemeligataj kaj fiks- is ke la reciprokaj oficialaj rilatoj okazos per Esperanto. Al tiu ĉi senprecedenca — ia- sence eĉ sensacia — rezulto kontribu- is la agado de la Esperanto-societo en Herzberg.

Ne temas nur pri surpapera decido, ĉar ekde la menciita dato la kunlaboro inter Herzberg kaj Góra akiris tre konkretajn formojn. Ekzemple, en somero 2005 la E-societo en Herzberg du semajnojn gastigis kaj trejn- is sep instruistojn el Góra, kiuj poste vastaskale instruis la internacian lingvon en sia urbo. Plej originale estis samjare la dusemajna internacia Arbara Lernejo apud Herzberg, dum kiu aranĝo multaj infanoj el ambaŭ landoj plibonigis sian Esperantan lingvoscion. La sama iniciativo ripetigis en 2007 kun la partopreno de trideko da ĝelernantoj kaj ĝeinstruistoj.

Alia aspekto de la ĝemeliĝo estas la multnombraj kursoj de Esperanto, okazantaj en ambaŭ urboj.

Ĉu ne temas pri modelo de internacia kunlaboro, kiun oni devus imiti?

Por pliaj informoj vizitu la paĝon: www.ic-herzberg.de

Ĉe la bordo de la rivero Odra

La 1^{an} de majo 2005 Pollando kun aliaj naŭ landoj aliĝis al Eŭrop-Unio. Tiam

okazis sur la ponto super la rivero Odra granda festo: renkontiĝo de germanoj kaj poloj el la du partoj de unu urbo: Frankfurt-Słubice.

Ĉi-jare ni festis la duan datrevenon de tiu evento. La germanaj esperantistoj invitis la membrojn de E-asocio el Zielona Góra. Ni ĝoje akceptis la inviton, ĉar ni jam de pli ol dek jaroj kunlaboras kun la frankfurta kaj berlina E-asocioj. Alvenis ankaŭ esperantistinoj el Góra; la urbe- to famas pro la modela kunlaboro kun ĝemala urbo Herzberg surbaze de la lin- gvo Esperanto.

Ni ĝoje amuzis sur la bordo de la rive- ro, kie bele ludis la junulara orkestro kaj okazis ankaŭ aliaj amuzaĵoj.

Poste niaj amikoj invitis nin al sia side- jo, kie ni ĉiuj havis okazon aŭskulti inte- resan prelegon de juna esperantisto el Nepalo. Post la prelego ni starigis mul- tajn demandojn pri tiu malproksima lan- do, en kiu oni ankaŭ lernas Esperanton.

Ĉeestis ankaŭ tre simpatia juna ukra- inanino, kiu gastas en Frankfurto. Kaj ni ĉiuj povis facile interkompreniĝi pere de unu facila lingvo Esperanto. Jen eta ek- zemplo kiom simplaj kaj amikaj povas es- ti la rilatoj inter la homoj kaj nacioj — nur kondiĉe se ili tion vere deziras.

Bożena Pietrzyk



Krakova Societo Esperanto...

...denove elektis siajn gvidantojn. Ne mi- rige, ke kol. Lidia Liĝeża fariĝis denove la Prezidantino de tiu ĉi 60-persona, plej vi- gla E-societo en Krakovo. La Societo pri- parolis sian ĝisnunan agadon kaj aktiva- don, kiu tutcerte estas modela por aliaj kulturaj aranĝoj.

Czesław Baranowski

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio LAŬ

Tiu ĉi prepozicio, relative malofte uzata de esperantistoj, esprimas ĝenerale la konformecon kaj pli precize ĝi estas montranta:

1. Vojon, irejon aŭ longforman objekton, kiun iu (io) sekvas en movo.

Ekz.: Multaj iris al la strando **laŭ** maljarĝaj vojetoj, sed ni atingis ĝin promeneante **laŭ** la ĉefa strato de Mielno. Salubraj (= favoraj por la sano) estas



Nova filio de PEA en Dąbrowa Górnicza

Danke al sindonema, instrua kaj organiza laboro de Kol. Jerzy Walaszek (ni skribis pri lingvaj kursoj, organizitaj de li dum 2 lastaj jaroj en DG) kaj favora rilato de la Fremdlingva Biblioteko al esperantistoj, la 24^{an} de marto 2007 oni fondis en Dąbrowa Górnicza la filion de PEA. La fonda kunveno partoprenis 17 novaj membroj.

Novelektita estraro konsistas el:
Rajmund Kubisa — la prezidanto
Izabela Soborak — la vicprezidantino
Eugeniusz Dimitruk — la kasisto.

Malgraŭ evidenta sukceso pri la fonda, la nova filio baraktas nun kun manko de propra kunveno kaj loko por relative riĉa biblioteko.

promenoj **laŭ** la marbordo. Ni konkuris naĝante **laŭ** la fluo de la rivero. Maljunuloj laciĝis irante supren **laŭ** la ŝtuparo. Soldatoj rapide krablis **laŭ** la defenda remparo. Jam multaj vagis en la dezerto **laŭ** vojoj sablozaj. Por atingi la celon iru **laŭ** la vojo de la prudento. Neniam deflankiĝu de la rekta vojo, **laŭ** kiu vi estas iranta.

Rimarkoj: La prepozicio **laŭ** povas montri ankaŭ:

a) ion nevojan, kies direkton io sekvas. Ekz.: Ĉiun katon oni devas karesi **laŭ** la haroj (= laŭ la direkto de la haroj);

b) sentuŝan movon. Ekz.: Ni iris **laŭ** la rando (la movo okazis apud la rando, ne sur ĝi).

2. Adaptiĝon al ies sento, volo, ordono, kutimo k.t.p.

Ekz.: Ŝi restis en la firmao **laŭ** la ordono de sia estro. Li ĉiam agas **laŭ** sia kapo kaj ĉiu besto agas **laŭ** sia instinkto. Mi aranĝis la ĝardenon **laŭ** mia plaĉo. Ni preparas la manĝaĵon **laŭ** nia gusto. **Laŭ** la kutimo ni matenmanĝas je la sepa matene. Mi volonte faros tion **laŭ** via deziro. Gejunuloj dancis **laŭ** moderna muziko. **Laŭ** la deviga leĝo ĉiuj davas pagi la rektan imposton. Oni povas lerni Esperanton **laŭ** diversaj lernolibroj. La listo de kongresanoj ne estas preparata **laŭ** alfabeto. La nomo Zamenhof estas

skribata en la tuta mondo **laŭ** la pola ortografio. **Laŭ** principa decido de UEA la Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2009 okazos en Pollando.

3. Dependecan de iu cirkonstanco, pro kiu oni agas aŭ per kies karaktero oni direktas sian agon.

Ekz.: Dio kreis la homon **laŭ** sia bildo. Ne decas **laŭ** propra volo komentarii la sanktan tradicion. Oni devas trakti ĉiun homon **laŭ** lia merito. Koniĝas birdo **laŭ** flugo kaj homo **laŭ** ago. La boatoj veladis **laŭ** la direkto de la vento. Mi kopiis ĉion **laŭ** la originala manuskripto. Ŝi mbligis la ĉambron **laŭ** siaj financaj eblecoj. **Laŭ** via mono mezuru ĉiam vian veston. Esperantaj vortoj estas formitaj **laŭ** la reguloj de la lingvo internacia. Neniam respondu al malsaĝulo **laŭ** lia malsaĝeco. Se vi deziras esti sana, vivu **laŭ** la leĝoj de la naturo. Ripetadu ofte mian konsilon vorto **laŭ** vorto.

4. Referencaĵon, sur kiu baziĝas konstato, juĝo, rakonto.

Ekz.: **Laŭ** la unua rigardo ĉio ŝajnas ĝusta, sed **laŭ** mia vidpunkto vi eraras. Tiu ĉi libro estas verkita **laŭ** malbona stilo. Neniam juĝu pri grava afero **laŭ** ĝia ekstero. Li kondukas sian filon **laŭ** la vojo de saĝo. **Laŭ** la beleco kaj honesteco ŝi estas la portreto de sia patrino. Ĉiu mezuras aliajn homojn **laŭ** sia mezurilo. Homoj taksas vin **laŭ** tio, kiel vi aspektas. **Laŭ** la aspekto vi ŝajnas pli maljuna ol mi. Ĉu estas bone konata al vi la Evangelio **laŭ** Mateo? Tiu ĉi bildo estas pentrita **laŭ** la maniero de Rafaelo. Vi desegnis ĉion **laŭ** bona perspektivo. **Laŭ** historia kaj arkitektura vidpunkto multaj konstruaĵoj en Krakovo estas tre valoraj.

Vortfarado kun la prepozicio LAŬ, kiu funkcias ankaŭ prefiksoide.

laŭe (= laŭ tio, konforme al tio) — Ne forgesu agi laŭe.

laŭiri (= iri laŭlonge de) — Ni laŭiris la riveron dum kelkaj semajnoj.

laŭlonge, laŭlarĝe (= laŭ la direkto de la longo kaj larĝo) — Mi travojaĝis Pollandon laŭlonge kaj laŭlarĝe.

laŭordone (= laŭ la ordono de iu) — Mi venis al vi laŭordone de...

laŭdezire (= laŭ deziro de iu pri io) — Ŝi pretas ĉion fari laŭdezire.

laŭeble — Respondu al mi laŭeble ĝis la fino de la monato.

laŭvole — Vi povas ricevi teon aŭ kafon laŭvole.

laŭmezure — Trinku Alveon laŭmezure, po unu kaliketo ĉiumatene.

laŭplane — La programo de nia aranĝo estas realigata laŭplane.

laŭpeze, laŭvole, laŭbezone, laŭeble, laŭtranĉi, laŭĝustigi, laŭfari.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio LAŬ el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof:

Laŭ la agoj de l' homo estas lia nomo.

Edziĝo laŭ koro, laŭ la kvanto da oro.

Laŭ ĉiuj leĝoj de la arto.

Elektu edzinon laŭ deveno kaj ne laŭ mieno.

Mezuri laŭ sia metro.

Ricevas bandito laŭ sia merito.

Vivu stomako laŭ stato de l' sako.

Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero.

Laŭ la frukto oni arbon ekkonas.

Ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento.

Birdo kantas laŭ sia beko.

Katarzyna Szałapska

Wyższa Szkoła Studiów Międzynarodowych w Łodzi

Esperanto en la interkultura komunikado

Resumo de la magistra disertacio

La celo de tiu ĉi disertacio estas prezenti signifon de la lingvo Esperanto en komunikado inter la homoj en la tuta mondo. Oni provis krei specifan monografion de la lingvo, priskribante ĝian valoron, problemojn flanke de skeptikistoj, kiuj renkontis la lingvo mem kaj ĝia aŭtoro kaj tion, kiel la lingvo enkreskis en la historion de la mondo, kaj kiajn ŝancojn ĝi havas por firmiĝi sian pozicion.

La disertaĵo priskribas la kreadon de Esperanto kaj ĝiajn sortojn. Ĝi montras la rolon, kiun Esperanto plenumis de sia komenco en la procezo de interkompreniĝo inter kulturoj, kiel ŝanĝadis ĝia rolo dum la XX jarcento kaj kia estas signifo de la lingvo en la nuna tempo.

La laboraĵo konsistas el tri ĉapitroj. En la unua ĉapitro per analizo de du nocioj oni prezentis la signifon „komunikado interkultura”. Oni klarigis kiom forta estas ligo inter komunikado interkultura kaj lingvo, ĉar la lingvo estas principa objekto de la tuta laboraĵo.

Tiu ĉi ĉapitro estas enkonduko al esenco, kiu estas la lingvo Esperanto.

La dua ĉapitro prezentas historion de ekzisto de Esperanto, kaj ankaŭ sekreton de ĝia simpleco, kiu kaŭzas, ke la homo kun meznivela kapablo dum kelkaj monatoj de lernado povas koni ĝin perfekte, kio ne estas akirebla en aliaj lingvoj etnaj kaj artaj. Rilate al la lastaj, en tiu ĉi ĉapitro oni prezentis aperintajn ĝis nun la artajn lingvojn

montrante strukturon de kelkaj el ili, komparante ilin kun Esperanto kaj kaŭzojn, kial ili ne estas akceptitaj kiel internaciaj.

La sekva ĉapitro, la plej enhava, rakontas pri funkcioj, kiujn plenumis kaj plenumas Esperanto en komunikado inter la homoj de diversaj nacioj kaj pri signifo, kiun ĝi havas por la homoj parolantaj Esperante. Ĝiaj subĉapitroj priskribas, kiel en pasinteco la internacia lingvo estis uzata en diversaj domenoj de la vivo. Estas prezentitaj interesaĵoj rilate al radio, gazetaro kaj grandega kvanto da Esperantaj Asocioj ariĝantaj la homojn de diversaj profesioj, kio ankaŭ estas parto de komunikado.

Sekve, oni koncentriĝis je ekzisto de Esperanto en la plej gravaj estraraj organizaĵoj, ĝia stato en ili kaj penoj por grandigi ĝian signifon. En la ĉapitro oni ankaŭ provas analizi la pozicion de la lingvo internacia kompare al nuna pozicio de la angla lingvo en la mondo.

La historio kaj sortoj de la lingvo Esperanto, prezentitaj en tiu ĉi disertacio montras, kiom multe da peno oni oferis, por ke hodiaŭ la lingvo estu konstante uzata.

Oni parolas ne nur pri la laborego de la aŭtoro, kiu dum multaj jaroj perfektigis la lingvon ĝis la nuna formo, sed antaŭ ĉio pri la uzantoj, kiuj pli ol cent jarojn parolis en ĝi kaj batalis por ĝia daŭro. Ĝus ilia fervoro kaj kredo en Esperanton kaŭzis, ke la lingvo estas por multaj homoj en la mondo simbolo de unueco.

Mi estas homo – originalaj verkoj de d-ro L.-L. Zamenhof

Mi estas homo

Eble pro la centjariĝo de la interna ideo aŭ pro la 120a datreveno de la lingvo mem, eble pro la 90-jara memorigo de la morto de Zamenhof aŭ eĉ antaŭvide al la 150-jara jubileo de lia naskiĝo, la intereso pri la konceptoj de „la Majstro”, ne nur lingvaj sed ankaŭ filozofiaj kaj etikaj, plu kaj plu kreskas. En 2003 aperis en Toruń, ĉe Esperanto-societo FLAMO Kongresaj paroladoj de L. L. Zamenhof kiel manifesto de esperantismo de Jiřka Skalická; en majo 2006 aperis ĉe Krakova Societo Esperanto Esperanta verkaro de fratoj Zamenhof de Marian Kostecki; en la itala ĵus aperis kolekto de tekstoj pri interlingvoj, kun aparta rigardo al Esperanto, fare de Paolo Valori.

Kvankam eble neniu esperanta tekstaro estis tiom studita kaj eldonita kiom la zamenhofa, tamen mankis sinteza kolekto de liaj multaj tekstoj ankaŭ alilingvaj, disdate kaj disloke aperintaj inter diversaj rusingvaj kaj judlingvaj gazetoj, plus unu intervjuo anglalingva. „Kanonaj libroj” oni nomas tiujn, kiuj formas la bazon, laŭ kiu oni ĝuste analizu iun doktrinon: nepre neceso koni tiujn, kaj koni tiujn plene sufiĉu.

Konsultado de fakuloj

Nu, la nun recenzata verko de Aleksander Korĵenkov, aperinta en Kaliningrado kiel n-ro 6 de la serio Scio, difinas tiun kanonon por la zamenhofa filozofio. Ĉar ĉiu ajn decido pri tio, kio estas baza kaj kio akcesora, kuntrenas certan marĝenon de subjektiveco, la aŭtoro ne agis laŭ propra arbitro, sed konsultis diversajn fakulojn, de Blanke al Lins, de Sikosek (nun van Dijk) al Künzli. La tekstoj, kiujn li esploris, estis jam publikigitaj, sed, ekzemple, tiuj tradu-

kitaj el la rusa (ĉefe de Holzhaus) prezentis makulojn; Korĵenkov tre skrupule retradukis aŭ, minimume, ĝustigis, tiel ke la kolekton eblas rigardi ankaŭ kiel enhavantan originalaĵojn.

La rezulto de ĉi tiu granda kaj tempokupa laboro pentras la figuron de la iniciatinto de Esperanto en sia pleneco, multe pli amplekse ol ĝi estas kutime konata ĉe esperantistoj. La ideo de komuna lingvo sukcesis, eĉ se nur etparte, ĉar ĝi estis facile komprenebla kaj alprenebla: ĉiuj uzu saman lingvon por interkomuniki inter malsamlingvanoj. Finfine tio estis ne malkutima situacio ĉe diverslingvaj civitanoj de unu ŝtato, regata de unu etno: la lingvo de la regantoj iĝis la lingvo de la tutŝtata komunikado. Alpreni do ununuran lingvon kiel komunikilon ŝajnis oportune al multaj; ke tiu lingvo estas art(efarit)a, gardis egalrajtecon por ĉiuj: neniu rezignis sian lingvon, neniu la sian trudis.

Kontraŭdiraj konceptoj

Sed la lingva aspekto estis nur parto de multe pli ampleksa mondrigardo kaj ege pli ambicia celo de Zamenhof: krei homon, kiu, rezignante nek je sia lingvo, nek je sia kulturo, nek, precipe, je sia religio, sentu sin egala al la aliaj homoj, estu al ĉiuj respektema kaj de ĉiuj respektata. Ĉi tiu celo ne estis matura en la tempoj de Zamenhof, kaj ankoraŭ ne estas matura hodiaŭ: religio mem postulas, minimume, kredon je iu potenca senkorpa mistero, fortego, la mondon reganta, kaj la koncepto de religio „neŭtrale homa”, kun „neŭtrale homaj temploj” estas parte kontraŭdira en si mem.

Esti edukata en iu religio ne estis, nek nun estas, konsiderata iu historia hazardo, samkiel la naskiĝo en unu aŭ alia loko, aŭ en unu aŭ alia lingva medio, sed ĝi kuntrenas senton de supereco, de „pravo” en la komparo kun alikredanoj. Religion oni

konscie akceptas je aĝo de memstara pensokapablo; transiro de unu religio al alia estas konsiderata apostateco, dum transpaso al alia lingvo estas fenomeno sentata kiel multe pli normala kaj entute ne aparte kondamninda (tiel ke ne ekzistas specifa termino por tio). La koncepto de „elektita popolo”, kiun hebreoj havis kaj poste transdonis al kristanoj, ne estas akordigebla kun sento de egaleco sur la religia tereno; la koncepto de „revelacio” evidentiĝita al unu popolo sed ne al la aliaj, aŭ la koncepto pri gojo konfliktas kun egaleco. Tial la koncepto de „neŭtrala religio” povas pluvivi nur ĉe komplete abolicio de la kredo entute.

Neŭtrale homa

Sed Zamenhof kontraŭis tion, ĉar laŭ li la eksteraj formoj de la religio, festoj, ceremonioj, ritoj estas aferoj nerezigneblaj sen granda spirita kaj socia malgajno. Li firme kredis kaj asertis, ke sen religio homo ne povas havi riĉan spiritan vivon, kaj ke senreligiuloj, originantaj el kredoj diversaj, eĉ post la forlaso de siaj respektivaj kredoj restos fremdaj, same kiel diverskredaj religiuoj. Tamen ne eblas spuri konvinkan racian pravigon de tia ripetita aserto. Se preni nur simptomon, la traduko mem al naciaj lingvoj de la esprimo „neŭtrale homa”, „homarano”, „homaranismo” kaŭzis plurajn malfacilaĵojn, ĝuste ĉar la zamenhofa koncepto estas fremda al la ordinara homa menso, kaj la etnaj lingvoj ne produktis specifan terminon por tiu koncepto.

Zamenhof estis homo ekstreme aŭdaca kaj ekstreme timema samtempe. Li ekpaŝis per tre avangardaj ideoj kompare kun sia tempo, sed sen la kuraĝo ilin subskribi propranome. Li timis, ke pro la sameco de la proponinto la kontraŭeco kaŭzota de avangarda ideo, kiel homaranismo, endanĝerigos la stabilecon de ideo

jam pli facile akceptebla kaj eĉ preskaŭ larĝpublike akceptita, kiel internacia lingvo. La broŝuro, eldonita ruse en 1901, estis pseŭdonime subskribita Homo sum. En ĝi „hilelismo” estas difinita kiel nova religia partio en la sino de la jam ekzistanta hebrea religio, do temis pri la sama hebrea Mose-devena religio, senigita de flankaj „almiksaĵoj”. La tuta esenco de la zamenhofa projekto estis purigi la hebrean religion el ĉio kaŭzanta malhelpon, krei por la hebreoj propran lingvon, trovi por la hebreoj difinitan lokon.

Sed la ideo evoluis, kaj en januaro 1906 la dogmoj de hilelismo, intencita por la hebrea diasporo, estis etenditaj al la tuta homaro: la nova nomo homaranismo aperas en broŝuro anonima (!) en marto 1906. Kio estis okazinta intertempe? Ja, la fenomeno „Bulonjo”. La unua UK montris, ke la lingvo funkcias, kaj ke la adeptoj, kiuj povas prikonsenti universalan ideon ne nur pri lingvo sed ankaŭ pri homeco, estas ja ankoraŭ minoritato, sed minoritato ne tro malgranda. La tiom timitaj versoj Al Vi, ho potenca senkorpa mistero [...] Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali / por reunuigi l' homaron. / Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali / [...] La Forto mistera de l' mondo nin benos estis vekintaj grandan aplaŭdon. Kiel Zamenhof mem diras en nefermita letero al Beaufront, aperinta en Ruslanda Esperantisto, la impresoj de la Bulonja kongreso rapidigis la decidon publikigi la Deklaracion pri Homaranismo; kaj tiuj impresoj donis al Zamenhof la kuraĝon elpaŝi per la dua parolado en Ĝenevo pri la interna ideo kaj la tria pri la celo de la Esperanto-kongresoj, kiujn li intencis kiel kongresojn de la homaranaj ideoj.

Kion Zamenhof rifuzis el la siatempa socio, kaj kion li ne kapablis rifuzi? Li rifuzis, intime, la ideon de imperio, kiu egaligas

ĉiujn per subpremado; sed li ne kapablis rifuzi la ideon de ŝtato, unu ŝtato por ĉiu popolo. Zamenhof revis pri (ĉu ebla?) demokrata ŝtata strukturo, do tute disigante sin de Marx kaj de Bakunin. Usono povis esti unuapense modelo por la socio de li revata, sed la rezulto de judaj grupoj, migrintaj en Usonon, ne estis konservado de la propraj specifecoj, sed ja asimilado, kaj tion Zamenhof malkonsentis. La judoj, kiuj iris en Usonon, ne sukcesis konstrui tie judan ŝtaton, sed nur juddevenan minoritaton, rigardatan tiom suspekteme, kiom ĝi celas resti aparta.

Zamenhof revis pri 60.000-membra juda komunumo en Usono, kiu poste povu, laŭ la Usona konstitucio, peti agnoskon kiel memstara federacia ŝtato.

En sia cionisma epoko li favoris unuatempe tiun translokiĝon de judoj al Usono, sed poste transiris inter la favorantojn de juda ŝtato en Palestino.

Laŭetna ŝtato kaj religio

Sed du tute gravajn ideojn Zamenhof ne kapablis rifuzi. La ideon de laŭetna ŝtato kaj tiun de religio. Etnan ŝtaton li vidis kiel solvon de la problemoj de la unuopaj popoloj, precipe klasataj laŭ la lingvoj: sociajn tavolojn li preskaŭ neglektis aŭ eĉ preskaŭ ne rimarkis. En tre atentinda recenzo de la nuna verko, aperinta en La Ondo de Esperanto, n. 10, 2006, Walter Ŝelazny rilatigas la zamenhofan vidpunkton pri ŝtat-etiko al la francrevolucia slogano „libereco, egaleco, frateco”.

Sed la recenzinto refutas, ke tiu revolucio vere celis egalecon: ĝi fortranĉis tutan aron da nefrance parolantaj minoritatoj. La „egaleco” estis nur por franclingvaj francoj. Efektive, Zamenhof ne kapablis liberiĝi el la ideo de etna ŝtato, kie etnoj estas konturitaj laŭ la lingvoj.

Aliflanke, la religio li vidis kiel solvon de

la animaj problemoj de la individuo, tamen ne en persona dimensio, sed en tutsocia. Iu vere neŭtrale-homa religio (tamen ĉiukaze strikte monoteisma), kun siaj neŭtrale-homaj ritoj kaj festoj, estas la antaŭĉambro de ateismo, sed trans tiun antaŭĉambron Zamenhof ne sukcesis pluri.

La evoluo de la zamenhofa pensado

La 77 tekstoj, kunigitaj en la verko, laŭas diakrone la vojon de la evoluo de la penso de Zamenhof dum la jardekoj, ekde lia partopreno en la cionisma movado ĝis la homaranisma revo. Diakronismo tute oportuna, ĉar, ekzemple, la Plena Verkaro, redaktita de Dietterle, grupigas la zamenhofajn verkojn laŭ kategorioj (antaŭparoloj, gazetartikoloj, paroladoj, traktaĵoj, leteroj) kaj nur la esperantaj originalojn, tiel ke la rekonstruo de la pensevoluo estas malfacila. La unua peco de la nuna kolekto estas longa artikolo, poparte aperinta en rusa gazeto dum pluraj numeroj de 1882, pri tio, kiel estu solvita la „hebrea demando”, t. e. la trovo de loko, kie hebrea popolo vivi ne estante persekutataj.

Ni rimarku la daton: 1882, do multe pli frue ol Zamenhof ekpaŝis per Esperanto, sed multe pli malfrue ol li ekpensis pri internacia lingvo.

Tian internacian lingvon li konceptis por forigo de la malamikete de las nacjes, sed li konceptis ĝian aplikon tutunue al la diaspora hebrea popolo. La lasta peco estas fragmentoj pri Dio kaj senmorteco, trovitaj sur la skribotablo de Zamenhof ĉe lia morto, kiel atestite de Privat.

Oni preskaŭ ne trovos en la libro Esperanton, sed Zamenhofon kiel homon.

Malgraŭ la rigora selekto, kelkio estas ripetita: Zamenhof ne estis konciza, li iel predikis kvazaŭ el pupitro, per ekzemploj, enŝovante hipotezajn kontraŭajn opiniojn de hipotezita aŭskultanto kaj refutante ilin.

Multo estus ankoraŭ pritraktinda kaj

komentariinda, sed recenzo ne iĝu eseo. Ni nur konklude diru, ke en la rondon de la zamenhofologoj Aleksander Korĵenkov enpaŝas aŭtoritate per ĉi tiu saĝe kompilita kolekto de zamenhofaj tekstoj: verko absolute rekomendinda, legebla, danke al la bela stilo de Zamenhof, kun intereso preskaŭ de spur-avida detektivo, kaj facile komprenebla danke al ampleksa notaro kompetente kunmetita.

Carlo MINNAJA

Aleksander Korĵenkov: *Mi estas homo — originalaj verkoj de d-ro L.-L. Zamenhof*. Eld. Sezonoj, 2006, 288 broŝuritaj paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 24,00 eŭroj + afranko

Por mendĵi, vi krozu al la Retbutiko:

http://www.esperanto.be/cgi-bin/mal/Web_store/web_storeie.cgi?keywords=estas+homo



Esperanto per rekta metodo

Saluton! Mi kunsendas la informon pri aperigo de la lernolibro por poloj „Esperanto per rekta metodo”, kiu aperis tuj post la pasko-festoj.

Ĝi estas moderna materialo, preparita per Stano Marček (redaktoro de la revuo *Esperanto*). Post la slovaka kaj universala (nur Esperante) versioj, estis prilaborita la pora versio pere de Stanisław Mandrak. Post kelkaj semajnoj aperos versioj: la ĉina, la rusa kaj la itala. Pli longdistance oni antaŭvidas la eldonon en sekvaj lingvoj. Informojn pri la eldonaĵo vi povos trovi ĉe: www.edukado.net/katalogo/19024

Aldone (sed pagataj aparte) al la lernolibro estas preparitaj instru-materiaĵoj kaj kompakt-diskoj kun ilustraĵoj kaj sondosieroj en mp3-formato.

La lernolibron distribuas la ĈE de PEA: pea@esperanto.pl, staman@esperanto.pl

Stanislavo Mandrak

Al Redakcio de „Pola Esperantisto”

Estimataj! Mi kiel jam longjara leganto de „Pola Esperantisto” (mi ekkomencis aboni PE en sepdekaj jaroj de pasinta jarcento) preskaŭ neniam skribis miajn opiniojn koncerne de la enhavo de PE. Hodiaŭ mi provas.

Kiam mi ricevas la vican, plej freŝan kameron de PE, mi tuj rapide trafoliumas ĝin por supraĵe ekkoni la enhavon. Iom poste, jam trankvile mi legas unu post la alia ĉiujn artikolojn. Sed de iu tempo mi observas la mankon de la informoj ligitaj strikte kun nia landa E-movado kaj precipe pri agado kaj aktivado de niaj landaj, lokaj E-grupoj, E-kluboĵoj, E-organizaĵoj. La eventualaj raportoj aperas nur sporade, kiel efemeridoj.

Do, ĉu nia landa E-movado fakte estas tiel modesta, ĉu raportoj pri ilia agado ne atingas la redakcion? Ĝenerale mankas al mi la konstanta anguleto dediĉita al polaj E-okazintaĵoj. Mi bone scias, ke de tempo al tempo iuj novaĵoj ligitaj kun nia landa movado estas afiŝitaj en interretaj paĝoj, sed ne ĉiuj esperantistoj estas konektitaj al Interreto, kaj ĝuste por tiuj oni valoras mencii pri iuj novaĵoj aŭ raportoj koncerne de la kluba E-vivo sur paĝoj de „Pola Esperantisto”.

Sed ĉu tio ĉi estas ebla?

Mi restas kun estimio

Antoni Dorosz el Radom

Kara Samideano!

Via letero estas eble la 10a, ricevita de la legantoj, de preskaŭ 5 jaroj. Dankon!

Pola Esperantisto, malgraŭ sia iom alia karaktero ol la movada „organo” neniam rifuzis aperi iun ajn informon aŭ raporton, se nur sendita ĝustatempe. Do, al viaj demandoj vi mem povas trovi respondon...



Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare,
eldonkvanto (nakład): 300 ekz.

N-ro (27) 3/2007 — ISSN 0032-2431

redaktas: Tomasz CHMIELIK, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGEZA.

konstantaj kunlaborantoj: Czesław BARANOWSKI, Danuta KOWALSKA,
Teresa NEMERE, Stanisław ŚMIGIELSKI.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu al la Eldonejo HEJME.

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl; retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

tel. (+48) 0602 277 604

La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:

Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21, skrytka 59

mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR (prioritate: 18,00 EUR) pagenda al:

landaj perantoj: (konsultu vian landan organizon);

supra banko-konto: (BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK) kun plena nomo kaj adreso;


UEA-konto: <kazl-s> de Kazimierz Leja. Nepre informu nin pri via pago!

Wakacyjna promocja Wydawnictwa HEJME:


W okresie od 10 czerwca do 10 sierpnia 2007
abonenci *Pola Esperantisto* **zamieszkali w Polsce**
otrzymują specjalny rabat na zakup poniższych 3 książek:



Maciej Zgondek
Iĝu esperantisto! Samouczek języka esperanto
ISBN: 83-907637-9-6
str.: 183, format: A-5
cena: 14,00 zł



Edmond Privat
Interpopola konduto
ISBN: 83-920289-3-7
str.: 144, format: A-5
cena: 20,00 zł



Predrag Matvejević
Alia Venecio
ISBN: 83-920289-2-9
str.: 144, format: 125 x 190
cena: 18,00 zł

Wpłacając kwotę 40,00 zł (zamiast 60,00) na konto bankowe HEJME
otrzymasz 3 ww. książki przesyłką pocztową. Promocja ograniczona!